

Raportoj de landaj sekcioj de ILEI por 2010

Kompilis: Teresa Liberska, Stefan MacGill, Trezoro
Dua eldono, septembro 2011



ENHAVTABELO

Albanio.....	2
Aŭstralio.....	3
Belgio.....	5
Benino.....	6
Brazilo.....	7
Britio.....	8
Burundio.....	9
Ĉeĥio.....	12
Ĉinio.....	13
Danio.....	15
Finnlando.....	16
Francio.....	17
Germanio.....	19
Hungario.....	22
Italio.....	23
Japanio.....	24
Kataluna Sekcio – Hispanio.....	26
Korea Respubliko.....	27
Kroatio.....	28
Kubo.....	29
Nederlando.....	30
Norvegio:.....	31
Pollando.....	32
Rumanio.....	35
Serbio.....	36
Svedio.....	37
Svislando.....	38
Togolando.....	39
Ukrainio.....	41
Usono kaj Kanado.....	42
ALDONO-1: Reprezentantoj de ILEI.....	44
ALDONO-2 Kontaktpersonoj de ILEI.....	45

ENKONDUKO

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) – havis 32 landajn sekciojn en la jaro 2010. Ili laŭ nia regularo (punkto 7.3.7) devas ĝis la 31a de marto ĉiujare raporti al la sekretario pri la agado dum la antaŭa kalendara jaro. Pri 2008 raportis 19 sekcioj, do plenumo de 60%. Pri 2009 raportis 21, kaj pri 2010 raportis 18. Tiuj prezentoj estas de ĝenerala intereso kaj utilo, do la estraro akceptis la taskon publikigi ilin en ĉi tiu elektronika formo. La kompilantoj aldonis bazinformojn de pliaj landaj sekcioj aŭ landaj reprezentantoj, kiuj ne sendis raportojn, tamen iumaniere publike montris vivsignojn.

La estraro alvokas, ke landaj sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj de ILEI bonvolu sendi raportojn, aŭ minimume bazinformojn, ideojn aŭ proponojn ĉiujare al la sekretario, kiu nuntempe klopodas krei bonajn kunligojn por priservi kaj kontentigi la sekciojn kaj membrojn.

Ni restas je la kredo, ke la sekcioj ludas esencan rolon en nia Ligo, do gravas scii kion ili faras, por ke ni trovu ekzemplojn de plej bona praktiko, kiuj povas funkcii (eble post modifo) kiel gvidiloj kaj inspiro por aliaj sekcioj.

Teresa Liberska, Stefan MacGill kaj Trezoro
La 31an aŭgusto de 2011

Albanio



Albana Esperanto Instituto(AEI) - Instituti Shqiptar I Esperantos (ISH)

Adreso: Bardhyl Selimi, rr. M.Muco P.50ap.3 Tirana 1004, Albanio, selimibardhyl@yahoo.com

Fondo/Aliĝo al ILEI: 1991/1993

Jura statuso: ne registrita ĉe la juĝejo

Rilato kun Landa Asocio de UEA: Kunlabora filio

Membro-nombro fine de 2010: 6 (retaj)

Nombro da rajtigataj / nomumitaj komitatanoj por 2010: 1/1(Shaban HASANI)

Retejoj: www.esperanto-en-albanio.info

Retgrupo: Ibanajesperantistoj@yahoogroups.com

Revuo: Bulteno de la Albana Esperanto Instituto, reta, en ĉiuj duaj monatoj, 25-30 paĝoj, redaktoro Bardhyl Selimi, selimibardhyl@yahoo.com

Enlanda membrotizo: 3000 L= 20 eŭroj, el tio 12 eŭroj estas pagitaj al ILEI por la reta.

Estraro: Honora prezidanto Vasil Pistoli, vasilpistoli@yahoo.com, en Novjorko; sekretario Bardhyl Selimi, selimibardhyl@yahoo.com, rr. M.Muco P.50ap.3 Tirana 1004, Albanio; kasistino, Rita Permeti, ritapermeri@yahoo.com, rr 4 deshmoret P.11/b ap.20 Tirana 1003 Albanio

Mandato-periodo: 3 jara, la sekva elekto en majo 2013

Agado 2010:

(Ne ricevis raporton)

Aŭstralio



ILEI-Aŭstralio

Adreso: Jennifer Bishop, 24/8 Wallen Rd., AU-3122 Hawthorn VIC, aŭstralio.

esperanto@education.monash.edu.au

Fondo/Aliĝo al ILEI: 1997/1997

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2010: 5

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2010: komitata rajtigo 1/ nomumita 1 (Jennifer BISHOP)

Retejo: ne

Retgrupo: ILEI-Aŭstralio@yahoogroups.com

Revuo: ne

Enlanda membrokotizo:

Estraro: Jennifer Bishop, 24/8 Wallen Rd., AU-3122 Hawthorn VIC,

esperanto@education.monash.edu.au

Mandato-periodo:

==Agado 2010==

1. Korespondkurso Servo de AEA – Komsiiito- s-ino Hazel Green

Dum la jaro 09/10 neniu nova kurso estas enkondukita, do la korespondkurso servo restas bazita sur fruaj kursoj uzantaj la libron “Esperanto by Direct Method” de Stano Marček kaj lia lumdisko “Modela Elparolo.” Oni povas daŭrigi perkorespondan lernadon per kurso bazita sur libro de Katalin Kovats “Detektivu pri la krimo de Katrina” (kurso 2a); per gramatika kurso “The Progressive Course” malnova brita kurso uzanta “Step by Step” de Montagu Butler (kurso 3); kaj per la perfektiga kurso de Boris Kolker “Vojaĝo en Esperanto-Lando” (kurso 4).

Ĉijare ŝi vendis nur 9 komencajn kursojn, kaj unu ekzempleron de kurso 2a. La servo provizis librojn de Stano Marček kaj vortarojn ankaŭ por aliaj bezonoj, kaj konsilis al pluraj pri interretaj kursoj.

Ĉiu aĉetinto trovis la servon aŭ per la interreto, aŭ per persona rekomendo de Esperantisto. Kiel kutime, ŝi petas, ke esperantistoj disdonu la broŝureton “For success in language learning” kiam taŭgas. S-ino Green tre dankas al la aro da kursgvidantoj, la ĉefa fortenco de la korespondkurso servo.

2. Somerkursaro en Sidnejo, Jan.10-23 de januaro 2010

Fariĝis kutimo aranĝi somerkursaron ĉe Internacia Domo de la universitato de Sidnejo. La instruistoj estis Penny Vos por infanoj, Jo Turvey por komencantoj/komencintoj kaj Sabine Trenner el Germanujo kun helpo de Jonathan Moylan por komencintoj. Trevor Steele instruis la progresintan grupon per libroj de Jean Ribillard. Malgraŭ la malpli granda nombro da studentoj ol kutime, ĉiuj tre ĝuis kaj profitis de la instruado, la ekskursoj kaj la ludoj vespere. Aparte bone estis akcepti studenton el Nov Kaledonio kaj plurajn el NovZelando.

3. Instruado

Kvankam instruistoj kutime planas kurson por komencantoj ekde februaro je la komenco de lerneja jaro, ni trovas ke post kelkaj semajnoj la nombro malkreskas ĝis finfine plej bone estas rekomendi al ĉiuj kiuj ankoraŭ interesiĝas, lerni per la interreto kaj ĉeesti klubajn kunvenojn.

Instruantoj estas en Suda Aŭstralio – Max Wearing, Trevor Steele, Bob Felby kaj Gordon Coleman al infanoj en sia klaso ĉe la baza lernejo, Sheidow Park Primary School. Li ankaŭ intencas prezenti teatraĵeton dum Jubilea Kongreso en Adelajdo. Ankaŭ grupo renkontiĝanta de tempo al tempo por lerni kaj babili gvidas Gloria Bristow.

En NovSudKimrio instruas Joe Turvey kaj Penny Vos, en Viktorio – Jennifer Bishop, Ivan Heldzingen kaj Marcel Leereveld, en Kvinlando – Sandra Connor kaj Dianne Lukes kaj en Okcidenta Aŭstralio – Vera Payne.

4. Ekzamenoj

Bedaŭrinde neniu faris AEA ekzamenon dum ĉi tiu jaro sed ,dum ili estis en Kubo, Jennifer Bishop kaj Hazel Green sukcese faris KER ekzamenon. Jennifer Bishop C1 kaj Hazel Green B1

5. Projektoj

Penny Vos, verkisto de “ Talking to the Whole Wide World”(Parolante al la Tuta Vasta Mondo), finance subtenata de AEA, vige laboris por promociado kaj vendado de la libro en la angla lingvo ĉe instruistaj konferencoj tra tuta Aŭstralio. Eminentaj fakuloj komencas subteni la projekton, akceptante ties valoron kiel provlingvo en bazaj lernejoj. Kompreneble ilia subtenado multe helpas, sed ĝis nun neniu lernejoj akceptis enkonduki Esperanton per ĉi tiu metodo.

ACARA- Aŭstralia Aŭtoritato pri Taksado kaj Raportado por la Nacia Studplano (Aŭstralian Curriculum Assessment and Reporting Authority) en Aŭstralio daŭre esploras por fari finan decidon. AEA penas trovi valoran lokon en la nova Nacia Studplano de lingvolernado. En la unua stadio estas decidita en januaro 2011 ke la ĉefaj lingvoj instruotaj estu la itala, mandarina, kaj indiĝenaj lingvoj Tamen en ĉiu ŝtato eblas daŭrigi la instruadon de aliaj lingvoj jam instruataj, kaj eble enkonduki la araban lingvon. Post la ebleco publike komenti kaj konsili al ACARA estos prezentotaj pluaj informoj pri la lingvoj kaj pri la instruado kaj ekzamenado. Ni daŭre esperas trovi niĉon por Esperanto-instruado probable en kamparaj lernejoj kaj en la familia edukadsistemo.

Tradukoj de T3W3 en aliajn lingvojn progresas, sed necesas atenti pri kulturaj diversecoj.

s-ino Jennifer Bishop, ILEI-komitato, AEA-direktoro pri Edukado

Belgio



ILEI-Belgio

Adreso: Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende, marc.cuffez@telenet.be

Fondo/Aliĝo al ILEI :

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA: kunlaboranta kun FEL - demando estas for por iĝi sekcio de BEF (Belga Esperanto Federacio) ekde 2012

Membro-nombro fine de 2010: 11

Nombro da rajtigataj/nomumitaj komitatanoj por 2010: 1/1 : Marc Cuffez

Retejo:

Retgrupo:

Revuo:

Enlanda membrokotizo: 20/10 euroj

Estraro: sekciestro Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende. marc.cuffez@telenet.be

Membro-nombro fine de 2010: 10 (7 paperaj / 3 retaj)

Mandato-periodo:

==Agado 2010==

En la lastaj jaroj la sekcio dormis. La nova sekciestro transprenis la sektion en majo 2010, kaj la sekcio komencis funkcii.

(laŭ mesaĝo de la sekciestro Marc Cuffez)

Benino



ILEI-Benino

Adreso: François Hounsounou, BP 226 BJ-Lokossa-Mono, Rep du Benin, West Afrika,
hounfranc@yahoo.fr

Fondo/Aliĝo al ILEI :

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2010: 5

Nombro da rajtigataj / nomumitaj komitatanoj por 2010:

Retejo:

Retgrupo:

Revuo:

Enlanda membrokotizo:

Estraro: sekciestro François Hounsounou, BP 226 BJ-Lokossa-Mono, Rep du Benin, West Afrika,
hounfranc@yahoo.fr

Mandato-periodo:

Agado 2010:(Ne ricevis raporton)

Brazilo



Brazila Sekcio de ILEI(ILEIBR)

Adreso:Leyster Miró, rua Jorge Tiburcia 592, Vila Mariana, BR-041-26001 Sao Paulo (SP)

leyster@gmail.com

Fondo/Aligo al ILEI: 1975/

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA: Sendependa de ĝi

Membro-nombro fine de 2010: 49

Nombro da rajtigataj/nomumitaj komitatoj por 2010:

Retejoj:

Retgrupo:

Revuo:

Enlanda membrokotizo:

Estraro:sekciestro Leyster Miró, rua Jorge Tiburcia 592, Vila Mariana, BR-041-26001 Sao Paulo

leyster@gmail.com

Mandato-periodo: 3 jara, la sekva elekto en majo 2013

==Agado 2010==

Eventoj kie oni partoprenis:

La sekciestro de ILEI partoprenis kaj prelegis en kvar esperantaj eventoj:

- BEL – Konferenco – Piracicabo – São Paulo
- Esperanto renkontiĝo en Lorena – São Paulo
- Esperanto renkontiĝo urbo São Carlos – São Paulo
- São Paŭla Esperanto kongreso – Piracicabo – São Paulo

En tiuj eventoj la sekciestro nome de ILEI pritraktis edukan kaj sekcian temojn.

Ekzamen-sesio en Brazilo – Unua fojo:

Kadre de la São Paŭla Esperanto kongreso, la ILEI brazila sekcio, EASP (São Paulo Esperanto Asocio) kaj Edukado.net, sukcese ekzamenigis (nur skriba parto) 33 homoj laŭ KER-sistemo. La sesio estis gvidata de D-rino Katalin Kovats (eksterlande) kaj la ekzamenanto estis D-ro Ivan Colling. Laŭ la kontrolo kaj raporto de la brazila ILEI sekcio: 12 homoj ekzamenigis B1; 10 homoj ekzamenigis B2; 11 homoj ekzamenigis C1. La sekcio stipendiis 7 homojn kiuj ne havis rimedojn por pagi la ekzamenon.

Anoj de ILEI 2010:

En la jaro 2010 aliĝis al la sekcio: 46 homoj kaj laŭ nia kontrolo:

33 A-kategorio

13 B-kategorio

Retejo Esperanto Ensino:

La sekcio prenis mane privatan projekton de esperantistino el São Paulo, kiu kreis virtualan E-komunumon pri instruado de Esperanto ene de la sistemo 'ning'. Ĝis nun la komunumo daŭras same kiel kiam la sekcio ĝin prenis, tio estas, neniu partoprenas. Pro tio, la sekcio de ILEI diskutas ĉu estos grave aŭ ne, daurigi tiun komunumon.

Censado:

En tiu jaro, la sekcio lanĉis censon por geinstruistoj, la celo estas scii kiom da instruistoj estas en la movado. Ĝi nuntempe daŭras, sed ĝis nun, respondis ĝin almenaŭ 60 homoj.

(Raportis: Leyster Miró)

Britio



ILEI-Britio

Adreso:

Fondo/Aliĝo al ILEI :

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2010: 3

Nombro da rajtigataj / nomumitaj komitatoj por 2010:

Retejo:

Retgrupo:

Revuo:

Enlanda membrokotizo:

Estraro:

Mandato-periodo:

Agado 2010 :

ILEI ne ricevis raporton, ne plu ekzistas sekciestro, kaj ĉiuj provoj de la estraro de ILEI malsukcesis trovi novan sekciestron aŭ sufiĉajn potencialajn membrojn. La Komitato en Kopenhago ĉesigis la ekziston de la sekcio julie 2011 dum la 44a Konferenco. Sed dum la Universala Kongreso tuj poste du/tri personoj anoncis sin, cele al restarigo de enlanda sekcio, kiu poste povos peti realiĝon.

Burundio



ILEI-Burundio

Adreso: Jeremie,Sabiyumva, BP 170, Rumonge, Burundio, jerrybs21@yahoo.fr

Fondo/Aliĝo al ILEI :

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2010: 7

Nombro da rajtigataj / nomumitaj komitatanoj por 2010:

Retejo:

Retgrupo:

Revuo:

Enlanda membrokotizo:

Estraro: sekciestro Jeremie,Sabiyumva, BP 170, Rumonge, Burundio, jerrybs21@yahoo.fr

Mandato-periodo:

==Agado 2010 ==

A. MOVADO

Periodo : de oktobro 2009 ĝis Decembro 2010.

La jaro 2010 estis jaro je kiu Esperanto en Burundo stagnis. Pro la striko en edukada ministerio, kluboj en lernejoj ne bonege funkciis kiel pasintajn jarojn. Ni tamen ;per la instrusekcio, sukcese organizis kursojn kaj renkontiĝojn en diversaj regionoj de Burundo. La nombro de kluboj ne altiĝis, renkontiĝoj organizitaj de kluboj okazis, vizitoj fare de la estraro okazis, kaj grava punkto estas la sukcesorganizita seminario en Bubanza je kiu partoprenis esperantistoj el Ugando kaj Kenio.

En ĉi raporto, ni detale skribos pri kio okazis en ĉiu sekcio,interalie la instrusekcio, Sporta sekcio, Junulara sekcio, Skolta sekcio, informsekcio,

I. INSTRUSEKCIO

En oktobro 2009 la instruado de Esperanto en lernejoj komenciĝis. En Rumonge, ĉiuj kluboj malfermis la pordojn kaj multaj kursoj de Esperanto estis gvidataj de instruistoj de ANEB. La Sekretario kaj la Kasisto de la asocio vizitis klubojn kaj vidis, ke ĉio estas en ordo. La nombro de kluboj restis la samaj, sed la nombro de la gelernantoj multiĝis. Okazis kursoj ankaŭ en aliaj regionoj kiel Gasanda, Nyanza, Bubanza, Gitega, Makamba, kaj en kelkaj lernejoj de Bujumbura.

Ĉi jare, la prezidanto de ANEB, s-ro Jérémie instruvojaĝis al Kenio kaj Ugando. Lia instruvojaĝo estis fruktodona ĉar en aŭgusto esperantistoj el la vizititaj landoj partoprenis la seminarion, kiu okazis en Bubanza kaj ilia lingvonivelo estis bona.

En Gasanda, kie nun la movado iras glate, multaj aliaj kluboj fondiĝis kaj nun estas multaj esperantistoj novaj en la regiono. Je la fino de la studjaro, en junio, la esperantistoj de Gasanda liceo kotizis por okazigi finjaran feston. Nomo de ANEB, Hasano kaj Pamphile partoprenis la feston kaj kuraĝigis la esperantistojn de la gasanda regiono kaj dankis la organizantojn pro la iniciato.

En aŭgusto 2010, ANEB organizis kaj okazigis seminarion en la provinco de Bubanza kaj multaj esperantistoj el diversaj provincoj ĝin partoprenis. Ne nur la burundaj esperantistoj, sed kvar esperantistoj el Kenjo kaj unu esperantisto el Ugando partoprenis la seminarion de Bubanza.

Kursoj normale okazis en ĉiuj kluboj sed ne okazis ekzamenoj pro la fakto ke niaj ekzamenoj okazas en julio kaj ĉi monaton okazis la dua nacia kongreso; la organizado kaj okazigo de ĉi kongreso prenis grandan monrimedon, kaj nun la kaso de ANEB estas malplena por okazigi tiujn ekzamenojn,kiuj estas tre gravaj. Ni planas okazigi tiujn ekzamenojn en la venonta jaro se rimedo estos.

En fino de aŭgusto 2008, ses instruistoj iris al foraj regionoj por unusemajna seminario, je kiu preskaŭ 100 personoj lernis esperanton. Ĉi instruado ebligis pro valora helpo fare de ILEI-konferencanoj en Benino kiuj monhelpis nian movadon.

En januaro, Johan Derks kun sia edzino Svetlana Milanovic, vizitis nian landon kaj dum ilia restado en

Burundo (Bujumbura kaj Rumonge) okazis instruado en Bujumbura je kiu tri kongolandoj sekvis kurson dum kelkaj tagoj kaj du semajna seminario en Rumonge je kiu pli ol 120 personoj partoprenis: 40 progresantoj, pli ol 80 komencantoj. Johano kaj Svetlana ankaŭ vizitis klubon al Gasanda, kiel pli ol 80 esperantistoj (komencantoj kaj progresantoj) atendis ilin. Dank al bonaj rilatoj de ANEB kun Direktoroj de lernejoj, la instruado okazas sen granda elspezo. La sekcio estis akceptita de ILEI dum la ĉi jara krakova konferenco kaj tio donas al nia movado grandegan forton pro la fakto ke instruado estas la bazo de nia movado. Ĉi sekcio estas gvidita de NTAHONSIGAYE Hasano kaj subkontrolo de la estraro de ANEB.

II. INFORMSEKCIO

Dum ĉi jaro, la informado ne estis bone farita kiel en pasintaj jaroj. Ni planis viziti radielsendejojn sed pro manko da tempo ni ne sukcesis tion fari. Ni tamen elsendis rete informesaĝojn al retanoj.

Okazis prelegojn en lernejoj, kaj ni afiŝis informilojn en kelkaj regionoj de Burundo.

Ni ricevis leteron el UNESKO, respondo pri nia kunlaborpeto, kaj tio estas kuraĝiga por ni. Plie ni sendis al UNESKO dokumenton pri jardeko de lingvo.

La informsekcio kontribuis per informo al ni, kaj pro ĝi ni sciis pri bezono de instruistoj kaj pri la staton de la movado en diversaj regionoj.

La sekcio nun ekinformas al en-kaj eksterlandaj esperantistoj pri kio okazas en Burundo per la Bulteno ESPERANTO EN BURUNDO, kiu baldaŭ ekaperos.

III. SPORTA SEKCIO

La agado de nia futbala teamo daŭris per partopreno en la loka turniro. Kiel en pasintaj jaroj, per la teamo, multaj sportemuloj informiĝis pri Esperanto. Bedaŭrinde dum ĉi jaro la sekcio ne ricevis subvencion de MELS, kaj tio negative afektis la agadon de la teamo.

Okazis korespondado kun Calgari Julio pri la starigo de Tchoukball teamo en Burundo esperantkadre. Ni esperas ke en la estonteco ni sukcesos je ĉi projekto.

Por varbi homoj kaj sciigi al multaj pri la ekzisto de Esperanto, ANEB pripensis kaj fondis la futbalan teamon, kiu ĉiam partoprenas la turneon en Rumonge. Nun alia teamo fondiĝis en Gasanda.

IV. JUNULARA SEKCIO

Ĉi sekcio grandparte dependas de ANEB kaj ĝia laborkampo estas tre vasta. En Burundo, granda parto de esperantistoj estas junaj, do kompreneblas ke ili estas membroj de la sekcio. La Prezidanto de la sekcio multe laboris, li okazigis renkontiĝojn en Bujumbura kaj Rumonge, kaj dum la seminario en Bubanza la sekcio ege helpis nin homforte, disponigante sian servon al la partoprenintoj precipe kiam akvoj ne ĉesis dum la seminario. Dum la ekskurso en Burunza, la sekcianoj kantegis senĉese kaj senlace ekskursanojn kaj eĉ survoje klarigis al loĝantoj pri kio estas Esperanto. La sporta sekcio agadas kiel branĉo de la junulara sekcio, eĉ se ĝi havas sian propran estraron. La agado de ĉi sekcio estas tre grava kaj la tuta movado dependas preskaŭ de ĝi.

V. SKOLTA SEKCIO

Post la starigo de la skolta sekcio lastan jaron, ĉi sekcio ekaktiviĝis. La sekcio nun klopodas atingi en ĉiuj regionoj, kie jam estas la skolta movado. Ĝi ankaŭ planas peti oficialan kunlaboron kun la skolta asocio de Burundo. Dum la seminario, SEL denove partoprenigis 10 skoltojn kaj ili multon lernis. La sekcio planas partopreni en Jxamboreo, kiu okazos en Gitega kaj tie ĝi instruos Esperanton.

B. UTILIGADO

Renkontiĝoj esperantaj okazis en diversaj regionoj de Burundo precipe en Rumonge, en Bubanza, en kelkaj lernejoj de Bujumbura, en Nyanza Lac... La plej grava el ili por ĉi jaro estas la seminario je kiu venis homoj el Ugando kaj Kenjo. Tuj post la seminario okazis renkontiĝo de la estraro de ANEB kun esperantistoj el Ugando kaj Kenjo kaj ni kundecidis fondi regionan organizon « Orienta Afrika Esperanto Federacio ». Ni ankaŭ, helpe de la Afrika Oficejo sukcesis fondi retejon, kie publikiĝos informoj pri la burunda movado.

La junulara sekcio partoprenis kaj kunorganizis konkursojn kun islama religio en Rumonge, kaj inter demandoj estis esperantaj.

En novembro 2010, ANEB sukcesis aĉeti terenon kie ni konstruos Esperanto-Centron. Gs nun nia asocio havas du grandajn projektojn :

1. La arba projekto : Kun la helpo de TAKE-Esperanto, ANEB jam havas la grundon kaj plantis fruktarbojn en ĝi. Ni dankas s-ron Michel el Francio pro la starigo de la projekto de arboj en Burundo por protekti la teron (mondon).
2. La konstruo de la Esperanto-Centro : Kun la monhelpo de la fondaĵo Esperanto en evoluo, ANEB aĉetis ter-pecon por konstrui tiun domon. Ni multe dankas la geedzojn Svetlana kaj Johan el Nederlando, kiuj pripensis tiun projekton en Burundo. Ni dankas ĉiujn donancantojn de niaj projektoj.

Je la 19/ 12/2010, kelkaj esperantistoj de Rumonge festis la Zamenhofan tagon.

C. PLANADO POR 2011

Kiel planoj, La landa asocio de UEA en burundo havas jenan planon :

- Okazigi seminarion por instruistoj en Nyanza-Lac
- Okazigi renkontiĝojn en multaj regionoj de Burundo
- Plifortigi la junularan, sportan kaj lernejan agadojn
- Kuraĝigi burundajn esperantistojn verki aŭ traduki librojn
- Fari karavanojn esperantajn en diversaj lokoj (Makamba, Muramvya, Kayanza, Bubanza,...) ;
- Multobligi elsendojn ĉe diversaj radiostacioj publikaj kaj privataj ;
- Sekvi la plantitajn arbojn en la grundo de Kizuka
- Helpi en la monvarbado por nia projekto pri Esperanto-centro
- Refreŝigi nian retejon regule
- Senĉese klopodi krei klubojn precipe en vilaĝoj kaj lernejoj
- organizi kaj okazigi aktivulan trejnadon en, Bubanza, Gasanda kaj Rumonge;
- Vizitoj al kluboj;
- Pludaŭrigi la ĝemelan projekton;
- Starigi tchoukball teamo

BEZONOJ

Por efike funkcii, ANEB bezonas:

1. Ĉiuspecajn librojn kaj pricepe gramatikaj kiel la bruŝuroj de « le cours de la langue internationale Esperanto ». Ni petas al ĉiuj, kiuj jam helpis kaj kiuj ne ankoraŭ helpis sendi al ni lern-, legolibrojn kaj vortarojn.
2. Disponigi al la asocio iom altan subvencion, por ke ĝi sukcese okazigu la aktivulajn trejnadojn
3. Por plibonigi nian scion rilate al la movado, ni petas al UEA per la Afrika Oficejo inviti dum la venonta UK kaj IJK (en Danio) kelkajn burundajn esperantistojn por ke ili vidu kiel oni organizas kaj okazigas la du aranĝojn.
4. ANEB ankaŭ bezonas specialan buĝeton por eltiri poŝtaĵojn
5. Disponigi rimedojn por informado

Por bone disvastigi Esperanton kaj starigi projektojn en Burundo, nia nacia asocio ANEB ricevas E-materialojn kaj la monhelpon. Ni ne povas fini nian raporton sen diri kelkajn bonkorajn esperantistojn, kiuj subtenis nian asocion kaj donacis materialojn (lernolibroj) kaj/aŭ monon (por aĉeti terenon kaj grundon, por okazigi seminarion) : Gesinjoroj Jeanne Marie CASH, Mireille GROSJEANS, Margaretha SYMEONS, Svetlana MILANOVIC, Mirka TOMECKOVA, Katalin KOVAT'S, Susanna BEGLARYAN, Johan DERKS, Michel BASSO, Renato CORSSETTI, David CURTIS, Ronald GROSSOP, Alfred PORTILLO, Jean Yves SANTERRE ; Osmo BULLER, ... Ne nur homoj, sed ankaŭ organizoj helpis nin : UEA, ILEI, SEL, Fondaĵo Hans, Fondaĵo Esperanto en evoluo, TAKE-Esperanto, Esperanto-France, SAT-Amikaro, Infanoj ĉirkaŭ la Mondo ...

Ĉeĥio



ILEI- Ĉeĥio

Adreso: Jana Melicharkova, CZ-696 02 Ratiskovice 938, melicharkova@quick.cz

Fondo/Aliĝo al ILEI :

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2010: 5

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2010:

Retejo:

Retgrupo:

Revuo:

Enlanda membrokotizo:

Estrararo: Jana Melicharkova, CZ-696 02 Ratiskovice 938, melicharkova@quick.cz

Mandato-periodo:

Agado 2010: (Ne venis raporto)

Ĉinio



Ĉina sekcio de ILEI (ILEI-CN)

Adreso: GONG Xiao-feng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang Univeritato, CN-330031, NANCHANG, Ĉinio, arko.gong@qq.com

Fondo / Aliĝo al ILEI: 1988/1988

Jura statuso: ne

Rilato kun Landa Asocio de UEA: sendependa

Membro-nombro fine de 2010: 5

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2010: 3/3

Retejo: farata

Retgrupo: Jes

Revuo: ne

Enlanda membrokotizo: RMB 100 por plenaj (ĉ. 11 EŬROj), RMB 50 (ĉ. 5.5 EŬROj) por retaj membroj.

Estraro: sekciestro GONG Xiao-feng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang Univeritato, CN-330031, NANCHANG, Ĉinio, arko.gong@qq.com; vicestro kaj sekretario de la sekcio LIU Bao-guo, verdakoro@yahoo.com.cn; Kasisto ZOU Jin, Kamelo_z@hotmail.com

Mandato-periodo: 3-jara, sekva elekto en la jaro 2011.

== Agado 2010 ==

Propraj aranĝoj dum 2010:

1). 2010.1.24 - 2.25, La 1-a Vintra E-kursaro (VEK) en Hainana Insulo, la plej suda parto de Ĉinio.

Sume 16 personoj partoprenis la kurson, Dennis KEEFE estis la ĉefinstruisto. Li verkis la lernolibrojn.

2). 2010.8.1-11, en Taiyuan, norda parto de Ĉinio, Somera seminario de ILEI-Ĉinio.

Ĉeestis pli ol 50 instruistoj, instruemuloj kaj gestudentoj, inkluzive 6 eksterlandaj kaj 1 enlanda instruistoj, kiuj prelegis, instruis kaj demonstris.

Dum la seminario okazis 4 kursoj por infanoj, gestudentoj, komencintoj kaj peregantoj, 13 prelegoj pri edukado kaj E-metodoj, 2 demonstraj kursoj, konigo de internacia ekzameno de Esperanto, Interkona vespero, Amuza vespero, Arta Vespero, ekskursoj, reta prelego, reta babilado per skajpo, reta transendo de la seminario.

Pli ol 100 lokaj interesitoj, gepatroj de infanoj ĉeestis la publikan prelegon al la socio.

Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:

2010.8.21-23, Dandong, norda parto de Ĉinio, la 6-a E-kongreso de nord-orienta Ĉinio.

2010.10.29-31, Nanchang, la 3-a Lushan-forumo de Esperanto.

Propraj projektoj dum 2010:

VEK (vintra E-kursaro en suda parto),

SEK (somera E-kursaro en norda parto)

Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:

Varba agado en Esperanto:

Varba agado en naciaj lingvoj:

Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:

Ni ricevis subvencion de ILEI/UEA por azia agado.

Konata E-instruado en via teritorio:

Baiyangshujie-Xiaoxue elementa lernejo

Loko: Baiyangshujie, Taiyuan, Shanxi, Ĉinujo

Nomo de lernejo: Baiyangshujie-elementa lernejo

Lernejtipo: Unuagrada/baza

Kontaktadreso: Baiyangshujie- Xiaoxue, Taiyuan, Shanxi, CN-030003

Kursogvidanto: WEI Yubin

kvalifiko:	diplomita lingvoinstruisto
lingvonivelo:	komencantoj
Ofteco:	2 horoj/semajno
Kvanto de kursanoj:	100
Aĝoj:	7-9j
Uzataj lerniloj:	Aŭtoro: LI Weilun Titolo: Moderna Esperanto por infano
Kursokomenco:	2008-03-04
Kursofino:	2012-06-30

Aliaj atingoj en 2010

Niaj membroj gvidis E-kursojn en altlernejoj, mezlernejoj kaj element-lernejoj. Ili faris prelegojn dum diversaj aranĝoj.

==== *Historio kaj Estonto* ====

Historio:

Perspektivoj por 2011

Membro-nombro: 46

Kompare al 2010, nia membro-nombro kreskas multe. En 2011 ni jam havas 46 membrojn. Aŭroras nova epoko de E-instruado en Ĉinio. Nuntempe pli kaj pli da E-kursoj funkcias en altlernejoj, mezgradaj kaj elementaj lernejoj. Ni bezonas altnivelajn E-instruistojn, bonkvalitajn lernilojn, ktp.

Multaj esprimis, ke ili subtenas nian laboron de ILEI-CN, ĉar Ĉina sekcio kontribuis multe de post sia restarigo. Se la kotizoj malaltiĝas, la nombroj kreskos pli multe.

Nun en Ĉinio estas 9 abonantoj al Juna amiko.

Agado:

1). kunlaboro kun korea sekcio kaj japana sekcio de ILEI en 2011.

ILEI-anoj el Ĉinio, Japanio kaj Koreio okazigos regulan renkontiĝon ĉiujare alterne laŭ la interkonsento en la kunsido dum la 6-a Azia kongreso de Esperanto en Mongolio.

La 1-a ILEI-seminario en Orienta Azio (ISOA) okazos en Tianjin, Ĉinio, de la 12-a - 15-a de aŭgusto, 2011.

2). La 2-a somera E-kursaro (SEK) en Tianjin, de la 8-a ĝis la 15-a de aŭgusto, 2011.

Estos paralelaj programoj de la 1-a ISOA.

Kunlaboro kun ILEI:

Nia sekcio deziras helpon de ILEI por plenumi nian komunan agadon inter Ĉinio, Japanio kaj Koreio en 2011. Antaŭ kaj dum la seminario okazos trejna kurso por gestudentoj, ni bezonos spertajn trejn-instruistojn.

Mankas al ni lerniloj.

La plej bona metodo por varbi pli da gestudentoj ŝajne estas ke senpage partoprenos la junaj studentoj. Nia lando estas tro granda, gestudentoj devas pagi multe por la veturado.


Kontribuoj al ILEI:

Instruista trejnado:

Opinioj pri ILEI:

(Raportis Gong Xiao-feng, sekciestro de ILEI-CN, 2011.3.29)

Danio



ILEI-Danio

Adreso: Bent Jensenius, Hojstrupvej 124, DK-2700 Bronshoj, bentjensenius@gmail.com

Fondo/Aliĝo al ILEI

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2010: 14

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatoj por 2010:

Retejo:

Retgrupo:

Revuo:

Enlanda membrokotizo:

Estraro: sekciestro Bent Jensenius, Hojstrupvej 124, DK-2700 Bronshoj, bentjensenius@gmail.com

Mandato-periodo:

=Agado 2010=: (Ne ricevis raporton)

Finnlando



Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj(ELFI) - Suomen Opettajien Esperantoyhdistys ry

Adreso: Sylvia Hämäläinen, E.Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 TAMPERE

sylvia.h@kolumbus.fi

FondoAliĝo al ILEI:1921/1951

Jura statuso: registrita societo

Rilato kun Landa Asocio de UEA: membra societo

Membro- nombro fine de 2010:17 (7 paperaj,10retaj)

Nombro da rajtigataj / nomumitaj komitatanoj por 2010: 2 / 2(Sylvia HAMALAINEN, Carola ANTSKOG)

Retejo: http://www.esperanto.fi/elfi_f.htm

Retgrupo:

Revuo: Interligilo

Enlanda membrokotizo: 8 eŭroj por ELFI

Estraro: prezidanto Sylvia Hämäläinen sylvia.h@kolumbus.fi; vicprezidanto Raita Pyhälä, sekretario

Tapani Aarne, estraranoj: Tiina Oittinen, Harri Laine, vicestraranoj: Carola Antskog , Tuomo Grundström

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj: marto 2011

=Agado 2010=

Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis: Lokaj kursoj.


Propraj projektoj dum 2010: Renovigo de la hejmpaĝo daŭras.

Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris: Helpado kaj tradukado en lernu.net._Modifo de la lernolibro Esperanto mutkattomasti (Stano Marček: Esperanto per rekta metodo) al la brajla skribo.

Varba agado en Esperanto: Kune kun EAF

Varba agado en naciaj lingvoj: Kune kun lokaj societoj en diversaj aranĝoj kaj kun E

Francio



Franca sekcio de ILEI - GEE

Adreso: Michel Dechy, 65 allée de la crémaillère, FR-59650 Villeneuve d'Ascq
michel_dechy@hotmail.com

Fondo/Aliĝo al ILEI:

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2010: 41 (30 paperaj kaj 11retaj)

Nombro da rajtigataj / nomumataj komitatanoj por 2010:

Retejo:

Retgrupo:

Revuo:

Enlanda membrokotizo:

Estraro: Prezidanto DECHY Michel, vicprezidanto CATIL Jo, sekretariino HOUVIEZ Maryvonne, vicsekretario RISTE Gaston, kasistino ARNAUD Monique

Mandato-periodo:

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj:

==Agado 2010==

Propraj aranĝoj dum 2010:

En la regiono de Chateauroux : Maryvonne Houvriez gvidis kursojn por infanoj kaj por plenkreskuloj en diversaj lokoj kaj klubo en mezlernejo.

Ni organizis renkontojn kelkfoje kun aliaj asocioj, ekzpoziciojn en diversaj publikaj lokoj, en lernejoj diversnivelaĵoj, foje eventoj pri ne perforto dum forumoj de asocioj aŭ de diversaj festoj aŭ dum libraj salonoj. Nia amikino Nathalie preparis vojaĝon, surbaze de Esperanto, kun la 3 infanoj (5 ĝis 10 jaraĝaj) ; ili vojaĝis tra Brazilo dum 5 monatoj. Ili ĉiuj sukcese prelegis publike pri iliaj vojaĝoj klarigante la bonegan akceptadon de esperantistoj.

Aranĝoj de aliaj kie sekcio aperis:

La lasta Membro-Kunveno de GEE okazis en Kaiserslautern la 22an de majo (Germanio). La 9-an de decembro 2010 okazis kunveno de la komitato de la N.R.O. Prelegis Jean Gadrey, emerita profesoro pri ekonomio en la Universitato de Lille. Monique Arnaud kaj Jean-Pierre Boulet ĉeestis.

Propraj projektoj dum 2010:

Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:

Pri **Fringoj** : Denove, ĉijare GEE subtenis la projekton FRINGOJ laŭ monsumo de 300€, kaj ni deziras al ĉiuj partoprenantoj de tiu evento "FRINGOJ" plej grandan kaj memorigan sukceson.

GEE monhelpis laŭ monsumo de 300€, por la renovigo de la retejo de Edukado.net.

Monique Arnaud GEE-kasistino plurfoje vojaĝis el Sète por helpi en la planado de la renkontaĵoj. Ŝi kontribuis al varbado de kandidatoj por C1-KER ekzameno

Christophe Chazarein el Tuluzo kunlaboris kun Xosé Conde el Barcelono por organizi en Tuluzo seminarion pri instruado kadre de « Flugiloj... » kaj partoprenis en seminario de Grésillon.

Dum majo 2010, klaso en Mezlernejo « Pierre Valdo Vaulx-en-Velin » apud Liono, akceptis kadre de la Projekto Comenius la tri aliajn klasojn el Pollando, Hungario, Bulgario dum unu semajno. Tre fruktodona laboro laŭ la grupoj miksitaj en atelieroj planitaj por cele verki la gvidlibron de la amikeco. En majo 2011 la infanoj vizitis la klason en Pollando kie finiĝas la ciklo de du jaroj, kompreneble la tri aliaj landoj ĉeestus.

Varba agado en Esperanto: Estis disdono de GEE-flugfolio.

Michel Dechy estis telefone vokita la 10an de decembro far Philippe Bouvard, kadre de la radioelsendo « la dikaj kapoj » (les grosses têtes), kiu okazas ĉiutage ĉe RTL por paroli pri ESPERANTO

J Catil agas surloke por prezenti Eon en bazlernejoj (CM2), kolegioj (dum la "kulturaj semajnoj"), liceoj, kaj en UTL (Universitato pri Libertempo) de Lille, instruas E-on

En 2010, **Michel Dechy** eldonis la libron : « La bildstrioj kiel lernolibroj », (32 + 4) paĝa lernolibro.

Post vojaĝo al Nepalo (marto 2011 **J Catil** jam dufoje prelegis pri « De Tinĉjo al Eo, kiaj belaj vojaĝoj! », miksante pedagogian sperton, Tinĉjon kaj E-on por allogi diversajn homojn ĉeesti tian prelegon.

Dum la jaro 2010, niaj geamikoj Alice kaj Cédric kiuj ofte renkontis esperantistojn dum la vojaĝo kuŝbicikle dum 2 jaroj kaj duono rehejmenigis.

Varba agado en naciaj lingvoj: Aperis artikoloj en lokaj ĵurnaloj

Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:

Konata E-instruado en via teritorio:

Aliaj atingoj en 2010

Historio kaj Estonto

Historio:

Perspektivoj por 2011

Disvastigi informojn pri la ebleco instrui esperanton enkadre de projekto Socrates-Comenius.

Organizi enketon por plani pli precize kie estas(us) instruata Esperanto.

- Liston de lokoj kie oni povas trapasi ekzamenojn,

- Ĝisdatigi la liston de instrumentoj.

La 36-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO okazos en oktobro 2011. Estus bone disdoni flugfoliojn verkitajn en la 6 lingvoj uzataj ĉe UNESKO. Ĝis nun GEE zorgis pri tio – redaktado kaj pago

Membro-nombro: Por ILEI 2011, la aliĝo kaj abono al IPR estis 18 eŭroj. Sin anoncis kiel geinstruantoj al GEE tra la UFE-kotizo : 114.

Kunlaboro kun ILEI: En 2010, GEE kolektis la jenajn informojn: Sébastien Montagne partoprenis la ILEI-Konferencon en 2010 (Matanzas en Kubo) kaj raportis pri tiu partopreno, raporto estis en LME. Nun GEE ŝatus kunlaboron de ILEI.

Opinioj pri ILEI: Nun GEE ŝatus kunlaboron de ILEI.

(Redaktis la agadraporton J Catil)

Germanio



Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) - Verband Deutscher Esperanto-Lehrer e.V (VDEL)

Adreso: Zsofia Korody, Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg am Harz, Tel. 05521-5983
zsofia.korody@esperanto.de

Fondo/Aligo al ILEI: 1968/2006.07.04(nova statuto, nova registriĝo)

Jura statuso:Asocio jure registrita ĉe juĝejo en Hannover, Amtsgericht, Registergericht, 04.07.2006

Rilato kun Landa Asocio de UEA: sendependa organizaĵo, faka asocio de GEA

Membro-nombro fine de 2010:

83+6 familianoj kun sama adreso, kiuj ne pagas plenan membrotizon kaj ne ricevas IPR de ILEI

Nombro da rajtigataj / nomumataj komitatanoj por 2010: 4 (Rudolf Fischer, Christof Krick, Harald Schmitz, Wolfgang Bohr)

Reĵeto: <http://esperanto.de/agei> (ĝin prizorgas Zsofia Korody)

Retgrupo: instru-german@yahoo.com

Revuo: Instru-Cirkulero, 2-6 paĝa informilo, poŝte kaj rete per instru-german@yahoo.com

Enlanda membrotizo: 25 EUR, restas 7 EUR/membro por landa agado

Estraro: prezidanto Zsofia Korody, Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg am Harz, Tel. 05521-5983, zsofia.korody@esperanto.de; vicprezidanto Dr. Rudolf Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, 48356 Nordwalde, Rudolf.Fischer@esperanto.de; kasisto kaj membradministranto Christof Krick, Gunninghauser Str. 11 a, 59955 Winterberg, christof.krick@esperanto.de; estrarano Harald Schmitz, Dohlenweg 2, 50259 Pulheim, hschmitzpul@gmx.de

Mandato-periodo:2 jaroj, sekva elekto en majo 2012

==Agado 2010 ==

AGEI estas komunutila asocio, agadas por interkompreniĝo de popoloj, eduko al paco kaj toleremo. La asocio helpas la lernejan kaj universitatan instruadon de Esperanto, proponas internaciajn amikajn kontaktojn inter lernantoj de Esperanto, instigas al internacia interŝanĝo de lernantoj, zorgas pri trejnado de Esperanto-instruistoj, ellaboras kaj disvastigas esperantajn instru- kaj ekzamenmaterialojn, rekomendas lingvajn ekzamenojn ankaŭ laŭ internaciaj normoj, kunlaboras kun similaj internaciaj fakorganizaĵoj, estas alparolpartnero por la ministerio pri edukado rilate al Esperanto-instruado.

AGEI organizas fakajn kunvenojn, instigas al verkado de fakaj artikoloj kaj fakliteraturo, donas fakajn servojn al siaj membroj.

Gravas ankaŭ la konsultado pri instruagado, metodika-didaktika helpo por gekolegoj, spertinterŝanĝo pri lerneja kaj eksterlerneja Esperanto-instruado.

Propraj aranĝoj dum 2010:

Torpedo-6, Tradicia Oktobra Renkontiĝo Pedagogia: pedagogiaj tagoj por klerigado, faka pluklerigado, spertinterŝanĝo inter gekolegoj.

En 2010 TORPEDO-6 estis samtempe ILEI-seminario pri projektoj kaj subvencipetado. Tiu temo tre gravis, ja estas grave serĉi kaj provi trovi ekstermovadajn monfontojn por instruado de Esperanto. La seminario vekis grandan intereson kaj instigis gekolegojn por mem iniciati ellaboradon de plurlanda internacia projekto por gejunuloj.

Aranĝoj de aliaj kie sekcio aperis:

Dum PSI (Printempa Semajno Internacia) en aprilo 2010, kie okazis prelegserio, studsesio pri Esperanto-gramatiko, literaturo, movadaj konoj, ktp.

Tie estis ofertataj ankaŭ la novtipaj UEA-ITK ekzamenoj kaj pluraj kandidatoj trapasis tie la B1, B2 aŭ C1 nivelan ekzamenon.

Propraj projektoj dum 2010:

Preparlaboro por organizi en 2011 agnoskitan klerigsemajnon, lingvolernadon (Bildingsurlaubswoche) kadre de popola altlernejo (KVHS) en Osterode. Ellaboro de alvokteksto kaj detala priskribo de la enhavo.

Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:

Comenius-projekto (2008-2010) kun lernejoj en Hungario kaj Britio, kaj Grundtvig projekto (2009-2011) de Germana Esperanto-Centro en Herzberg am Harz

Varba agado en Esperanto:

Varbado, alvokoj per la AGEI-hejmpaĝo kaj per cirkuleroj, artikoloj, alvokoj en IPR, Esperanto aktuell, ktp. Informado, varbado dum E-o renkontiĝoj kaj dum GEK

Varba agado en naciaj lingvoj:

per la AGEI kaj ICH-hejmpaĝoj en la germana

Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:

v. supre ĉe projektoj. Krome: AGEI kunlaboras kun popolaltlernejoj (VHS) ekz. por organizado de feriotempa studsemajno.

Konata E-instruado en via teritorio:

Vidu liston de lernejoj (bazaj kaj mezgradaj) kaj universitatoj ĉe edukado.net pri nombro kaj aĝo de lernantoj, grado de oficialeco, uzataj lerniloj, daŭro, intenseco ks.

Aliaj atingoj en 2010

Fortiĝo de Esperanto-instruado en universitatoj (Münster, Emden, Stuttgart)

== Historio kaj Estonto ===

Historio:

La biblioteko de ICH havas kaj konservas kelkajn historiajn materialojn de ILEI kaj havas kompletajn jarkolektojn de AGEI-cirkulero, IPR kaj Juna amiko. Ni havas planojn verk(ig)i historion pri nia asocio.

Perspektivoj por 2011

Membro-nombro:

Multjara stabileco.

La membronombro iom malkreskas pro aĝiĝo de la membraro, aliflanke ni varbas ankaŭ inter la junularo kaj kunlaboras ekz. kun GEJ per oferto de studsesioj, klerigmoduloj, alvoko al membriĝo. Tiel la membronombro ne multe ŝanĝiĝas, ĝojigas nin iom da kresko.

Agado:

AGEI plurfoje helpis ankaŭ dum 2010 al gekolegoj per metodikaj, fakaj konsiloj por starigi kaj gvidi E-kursojn en lernejoj, rekomendis lernolibrojn, taŭgajn metodojn.

Nova tasko aldoniĝis en aŭtuno: disvastigo de la traktitaj temoj, rezultoj, ktp. de la ILEI-seminario dum Torpedo-6, pluserĉado de financoj por subteni instruagadojn el eksterasociaj, ekstermovadaj fontoj.

Kunlaboro kun ILEI:

AGEI ekde jaroj estas la plej multnombra Landa Sekcio de ILEI. Aparte menciindas la alta nombro de membroj kun papera IPR.

Menciindas, ke por Torpedo-6 en oktobro 2010 ni ricevis iom da financa helpo por organizi la seminarion pri projektoj kaj subvencipetado, kiu traktis vere aktualan kaj utilan temon.

ILEI kontribuis al la Fondaĵo Esperanto-urbo (fondita en decembro 2010), ILEI-prezidanto estas en la kuratoraro. AGEI volonte kunlaboras, planas kunlabori en internaciaj ILEI-projektoj.

Kontribuoj al ILEI:

Per la partnereco kun ILEI, Interkultura Centro Herzberg plenumas plurajn taskojn, servojn. Surbaze de la bona rilato povas ekfunkcii fizika adreso, administrejo, oficejo por ILEI en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo.

En Herzberg estas bonaj kondiĉoj por stoki arkiv-materialojn, dokumentujojn, restkvanton de IPR-numeroj, JA, eĉ kun la celo de tie, el centra loko distribui ilin al abonantoj, interesigantoj pri provekzempleroj, ktp.

La instru-rilataj eventoj, renkontiĝoj en Germanio, la kunlaboro kun UAM kaj aliaj edukcentroj estas bona internacia varbado por ILEI.

Instruista trejnado:

Okazas per GEA-komisiitoj Peter Zilvar (por klerigado) kaj Zsafia Korody (por instruado) en serio de

Studsescioj (klerigmoduloj), kiujn la studemuloj povas plenumi per ĉeesto, per verkado de hejmtaskoj kaj diplomlaboraĵo, per prezentado de iu faka temo kaj per prelego, provinstruado. Per alvokoj AGEI subtenas la informadon pri la universitataj interlingvistikaj studoj kaj la instruista trejnado ĉe UAM, Poznan, PL.

Interkultura Centro Herzberg/Germana Esperanto-Centro ofertas siajn studsesciojn, metodikajn kursojn, instrukapabligan sistemon ankaŭ por internacia publiko.

La ellaborita klerigsesia modulo estis pretigita en 2009 por la Grundtvig-projekto (instruado al la generacio 55+), sukcese plenumita kaj prezentita por internacia uzo.

Nia klopodo estas la starigo de tiu modelo por unuecigo de instrukapabliga postularo internacinivele.

Opinioj pri ILEI:

Ni ĝojas pri pli vastskala, regula kaj bone administrata funkciado de ILEI, pri klara, travidebla financa stato kaj freŝa, bonnivela informagado perreta.

Gravas la iniciatoj por instruado kaj internacia disvatigo de Esperanto, malfermiĝo al novaj landoj, kontinentoj.

(Raportis Zsófia Kóródy, prezidanto de AGEI, 01.06.2011)

Hungario



Asocio de Hungariaj Esperantistaj Pedagogoj - Eszperantista Pedagógusok Magyarországi Egyesülete (EPME)

Adreso: Németh József, Ihász Fő u. 41/5. 8531 89/356 050,70/9310530, jozefonemeth@yahoo.com

Fondo/Aliĝo al ILEI: La 13an de decembro 1990/?

Jura statuso: ŝtate agnoskita, Budapest, Pk. 64957/1991/1, 1991.02.13 sub numero 3346

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2010: 57 [paperaj 38, retaj 18, aliaj (HM,DM) 1]

Ni havis 4 pliajn membrojn, kiuj ne apartenis al la internacia ILEI, do, sume ni havis 61 membrojn.

Nombro da rajtigataj / nomumitaj komitatanoj por 2011: 3

Retejoj: <http://www.ilei.info/hungario> (Ĝin prizorgas la sekciestro, J. Németh)

Retgrupo: ilei-hu@lev-lista.hu

Revuo: ne

Enlanda membrokotizo: 500 HUF

Estraro de la sekcio:

Prezidanto Németh József, Ihász, Fő u. 41/5. 8531 89/356 050,70/9310530, jozefonemeth@yahoo.com,

Kovács Márta, Budapest Ady E. 23-25/C. II.2. 1221 1/2263602, bdg.kovacs.marta@gmail.com

Salomonné Csiszár Pálma, Budapest Bakáts u. 1-3. III/1 1093 1/2173912, cspalma@freemail.hu

Sereghyné Zengő Enikő, Balsa Rákóczi u. 82. 4468 (42) 316 122, enimy@freemail.hu

Mandato-periodo: La 2-an de aprilo 2011 elektiĝos nova estraro.

== Agado 2010 ==

Propraj aranĝoj dum 2010:

ILEI-HU kaj Hungara E-Asocio organizis **Pedagogian Tagon la 14-an de novembro 2010** en Budapeŝto kun partopreno de ĉ. 50 kolegoj. Kadre de la evento okazis ankaŭ la asembleo de EPME. La asembleo voĉdonis pri la financa raporto de la prezidanto pri la jaroj 2008-2009 kaj akceptis ĝin. Dum la Pedagogia Tago okazis la sekvaj prelegoj:

- Ódor György: Prezento de nova lernolibro
- Wacha Balázs: Participo kaj verbotempo
- Vas-Szegedi Julianna: Comenius-programo
- Tötösné Gados Zsuzsanna, Salomonné Csiszár Pálma: Stumbliloj de dulingva ekzameno
- Behring Balázs: Kreiva lingvolernado
- Stefan MacGill: Novaĵoj en la internacia ILEI.

Konata E-instruado en la teritorio:

ni ne havas statistikajn informojn pri tio.

=== Perspektivoj por 2011 ===

Membro-nombro: inter 50 kaj 60

organizado de 1-2 pedagogiaj tagoj (t.e. seminarioj)

Opinioj pri ILEI: mi ne havis okazon demandi ilin...

(Raportis Jozefo Nemeth sekciestro)

Italio



Itala sekcio se ILEI - Sezione italiana dell'Associazione Internazionale degli Insegnanti di Esperanto

Adreso: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma, silkovojo@aliceposta.it

Fondo/Aliĝo al ILEI:

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA: kunlabora

Membro-nombro fine de 2010: 62

Nombro da rajtigataj / nomumitaj komitatanoj por 2010: 4/3 (Ana Maria COLACICCHI - Ermanno TARRACCHINI - Luigia OBERRAUCH)

Retejo: <http://www.xtec.net/~pmarti10/ilei-cat.htm>

Retgrupo: ne

Revuo: ne


Enlanda membrokotizo: same kiel ILEI

Estraro: sekciestro Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma, silkovojo@aliceposta.it

Mandato-periodo:

Agado 2010: (Ne venis raporto)

Japanio



Japania-Sekcio de ILEI / ILEI-JP

Adreso: ISIKAWA Tiekō(s-ino) isksanjo@ff.e-mansion.com, Tate 1-6-6-103, Siki-si, Saitama-ken 353-0006

Fondo/Aliĝo al ILEI: 1986/2010(reorganizita)

Jura statuso: Ne

Rilato kun Landa Asocio de UEA: konlabora

Membro-nombro fine de 2010: 23[paperaj 12, retaj 11, liaj (HM, DM) 5 enlandaj membroj]

Nombro da rajtigataj / nomumitaj komitatanoj por 2011: 2/2(ISIKAWA Tiekō, HORI Yasuo)

Retejoj: planas lanĉi retejon en 2011

Retgrupo: jes

Revuo: retan bultenon “LUCERNO” kelkfoje jare, neregule, redaktas s-ro Matuki Yoshinobu, myoshi@abelia.ocn.ne.jp

Enlanda membrotizo: 2700JPY (20 EUR) por paperaj membroj/1300JPY (9.6EUR) por retaj membroj (laŭ kalkulo fine de marto, 2010). La kotizo dependas de kurzoŝanĝo, kaj la kotizoj en japana eno inkluzivas tiujn de mense kaj aliaj necesoj por nia landa agado.

Estraro: estro ISIKAWA Tiekō(s-ino) isksanjo@ff.e-mansion.com, Tate 1-6-6-103, Siki-si, Saitama-ken 353-0006; Vicedestro TAJIMA Mayuko(s-ino) taji-mayu@hotmail.co.jp; Sekretario KINUGASA Hiroshi(s-ro) kinuhiros@yahoo.co.jp, Sinkawasaki 6-1-226, Saiwaki-ku, Kasasaki-si, Kanagawa-ken 212-0032; Kasisto ISINO Masayo(s-ino) isino.masayo@nifty.com, Isihara 3-9-5, Sumida-ku, Tokio 130-0011; Redaktoro MATUKI Yoshinobu(s-ro) myoshi@abelia.ocn.ne.jp, Saiwaityo 2-44-4, Futyu-si 183-0054

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj: 2jaroj, sekva elekto okazos en septembro, 2013

== Agado 2010 ==

Propraj aranĝoj dum 2010:

Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis: Fakkunsido de ILEI dum la 6-a Azia Kongreso

Propraj projektoj dum 2010:

Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:

- 1) Seminario de ĉina sekcio de ILEI en aŭgusto. Du ILEI-JP-anoj partoprenis kaj gvidis ĉinajn lernantojn.
- 2) Esperanto-leciono (septembro – decembro) en la supermezlernejo dependa de Saitama Universitato. S-ino ISIKAWA Tiekō gvidis la lecionon.

Varba agado en Esperanto:

Varba agado en naciaj lingvoj:

Varbado per la organo de JEI “La Revuo Orienta”

Varbado dum la Japania Esperanto-Kongreso

Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:

Konata E-instruado en via teritorio:

- 1) Esperanto-instruado en Ikeda-kita Supermezlernejo en Osaka 19 lernantoj (17-18 jaraĝaj), en la kadro de lernoplano “Interkulturo”, kiel duonjara regula, fakultativa lernobjekto.

Instruis s-ino Huzimoto Rituko uzante miksitajn manierojn.

- 2) Esperanto-instruado en Nippa Supermezlernejo en Yokohama dekkelkaj lernantoj (17-18 jaraĝaj), kadre de tutjara fakultativa kurso, instruis s-ro Kitagawa Hisasi (ne ILEI-ano) kun sia propraj lernomaterialoj.

Aliaj atingoj en 2010

ILEI-JP konstatis, ke tri orientaciaj sekcioj de ILEI, nome la ĉina, korea kaj japana, kunlaboros kaj okazigos la unuan komunan seminarion en aŭgusto 2011 en Ĉinio.

==Historio kaj Estonto==

Historio: Ni ne havas iun skribaĵon pri la historio de nia sekcio.

Perspektivoj por 2011

Membro-nombro:

Ni antaŭvidos iom da kresko. Ni utiligos nian organon por varbi novajn membrojn.

Mi gajnis kvin (inkluzive de mi mem) abonantojn al Juna amiko, sed JEI peris tiujn abonojn kaj ni ne havas informon pri aliaj abonantoj.

Agado:

Ni planas jenajn agadojn;

Trejnseminario por instruistoj.

Kontakti kun redaktoroj de lernolibro de la angla lingvo, kiu enhavas aldonajn paĝojn pri Esperanto. La celgrupo de la lernolibro estas ordinaraj plenkreskuloj.

Komuna fakkunsido de ILEI-JP kaj ILEI-Koreio en oktobro, dum Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio, en Koreio.

Kunlaboro kun ILEI:

Kontribuoj al ILEI:

ISIKAWA Tiekō daŭre laboros kiel ano de Elekta Komisiono.

Instruista trejnado:

Opinioj pri ILEI:

(Raportis ISIKAWA Tiekō, sekciestro, 2011.03.18)

Kataluna Sekcio – Hispanio



Kataluna Sekcio de ILEI(ILEI-Cat)-Secció Catalana de la Lliga Internacional de Professors Esperantistes(ILEI-Cat)

Adreso: Pedro M. Martin Bututxaga, Arnau Gatell 2, ES-1700 Blanes, ileicat@hotmail.com

Fondo/Aliĝo al ILEI: 1998/1999

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2010: 5

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2010: 1/1(Pedro. M.MARTIN)

Retejo: <http://www.xtec.net/~pmarti10/ilei-cat.htm>

Retgrupo:

Revuo:

Enlanda membrotizo: same kiel ILEI

Estraro: estro Pedro M. Martin Bututxaga, Arnau Gatell 2, ES-1700 Blanes, ileicat@hotmail.com

Mandato-periodo:

Agado 2010: (Ne ricevis raporton)

Korea Respubliko



Korea sekcio de ILEI (Hankook jibu de ILEI)

Adreso: LEE Jung-kee, Moklyun Usong Apt. 307-707, Bomke-dong, Dongan-ku, Amyang-si, Kyungki-do, KR-431-070, esperanto@saluton.net

Fondo/Aliĝo al ILEI:

Jura statuso: ne

Rilato kun Landa Asocio de UEA: Kunlabora

Membro-nombro fine de 2010: 26 (paperaj 26)

Nombro da rajtigataj / nomumitaj komitatanoj por 2011: 2/2 (LEE Jungkee, KIM Jinho)

Retejo: esperanto.or.kr/club/ileidekoreio.

Retgrupo: jes

Revuo: ne

Enlanda membrokotizo: ne

Estraro: LEE Jungkee (estro), KIM Jinho (polikjh@daum.net) kaj PARK Yongsung (esabpark@korea.com, vicestroj), BEK Sun-jo_([sekr. baj1031@hanmail.net](mailto:sekr.baj1031@hanmail.net))

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj: Ne fiksita

=== Agado 2010 ===

Propraj aranĝoj dum 2010:

Unua foje okazis seminario inter ILEI-anoj sub la nomo ‘La 1-a Seminario de ILEI-Koreio kaj kunsidis en la korea kongreso fake)

Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis: Dum Korea kongreso de Esperanto

Propraj projektoj dum 2010: La 1-a seminario

Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris: Ne

Varba agado en Esperanto: Ne

Varba agado en naciaj lingvoj: Jes

Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj: Ne

Konata E-instruado en via teritorio:

Seula Esperanto-Kulturcentro okazigas kurson ĉiumonate kaj neregule okazas kursoj tra Koreio. Nombro kaj aĝo de lernantoj, grado de oficialeco, uzataj lerniloj, daŭro, intenseco ks. Sufiĉas referencil edukado.net se la instruado estas tie dokumentita. Se ne, tuj kompilu kaj sendu la informojn al tiu renovigita retejo!

Aliaj atingoj en 2010: 26 koreoj aliĝis al ILEI

=== Historio kaj Estonto ===

Historio: mi esploros.

Perspektivoj por 2011

Membro-nombro: 26 personoj aliĝis

Agado:

2-a Seminario okazis marte, 2011

1-a Seminario de Orientazia ILEI en Ĉinio

Faka kunsido en Komuna kongreso inter Koreio kaj Japanio

Kunlaboro kun ILEI: Konkrete ne estas.

Kontribuoj al ILEI: LEE Jungkee estas preta moviĝi por azia ILEI, kiel eksa prez. de KAEM

Instruista trejnado: Ne

Opinioj pri ILEI: Korea sekcio sendas leterojn sed respondo raras bedaŭrinde.

(Raportis LEE Jungkee / korea sekciestro, 2011.3.21)

Kroatio



Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto(UPE) / Udruga predavača Esperanta(UPE)

Adreso: Marija Jerkovic', Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, mjerkovic@net.hr

Fondo/Aliĝo al ILEI:2007/

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA: konlabora

Membro-nombro fine de 2010: 10(paperaj 2, retaj 8)

Nombro da rajtigataj / nomumitaj komitatanoj por 2011: 1

Retejoj kaj kontaktiloj sekciaj:

Retgrupon: ne

Revuo: ne

Enlanda membrokotizo: 7 eŭroj

Estraro: prezidanto Marija Jerkovic, sekretario Emil Hrvatin,

Mandato-periodo: sekva elekto en 2011

=== **Agado 2010** ===

Ni organizas kursojn, instruas en lernejoj, ni eldonis kune kun UZE (zagrebaj esperantistoj) la libron de Stano Marcek: Direkta metodo, ni organizas ĉiu jare la konkurson pri scio de Esperanto por la gelernantoj de elementaj kaj mezlernejoj. Ni strebas tion fari la internacian konkurson. Ni organizas la grupon por partopreni kongreseton.

Propraj aranĝoj dum 2010: menciitaj

Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:

La prezidantino prelegis en la lingva gimnazio: Kio estas Esperanto?

Varba agado en Esperanto: Radie kaj "facebook" informojn

Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:

Ne, sed ni planas aranĝi la internacian kunvenon apud la Adriatika maro por la infanoj en majo 2011

Konata E-instruado en via teritorio:

En lernejoj: Mladost, kaj Retkovec, 20 lernantoj, 10-15 aĝaj

En KEL kaj en Djurdjevac laŭ la Zagreba metodo, 3 lernantoj, 17-30 aĝaj

Aliaj atingoj en 2010

=== **Historio kaj Estonto** ===

Perspektivoj por 2011

Membro-nombro: 15

Mi antaŭvidas la kreskon ĉar novaj membroj alvenas. La nombron da abonantoj al Juna amiko mi scios baldaŭ.

Agado:

Niaj planoj estas la samaj kiel ĝis nun.

Kunlaboro kun ILEI:

Ni bezonas la helpon pri la informoj en kiuj landoj oni povas kontakti kun instruistoj

Kaj ni volus viziti Herzbergon sed ne havas monon por tio.

Kontribuoj al ILEI:

En nia lando volonte agas internacie, ekzemple kadre de komisiono de ILEI, Marija Jerkovic

Instruista trejnado:

Nia sekcio pretas instigi la Landan Asocion en nia lando anonci stipendiojn por helpi al nialandaj instruistoj, partopreni en instruisto-trejnaj kursoj de ILEI aŭ ĝiaj partneroj en 2011

Opinioj pri ILEI: Bona laboro

(Raportis Marija Jerkovic, prezidantino de la kroata ILEI sekcio, 19.12.2010)

Kubo



ILEI-Kubo

Adreso: Marta Alonso Gutierrez, Malecon 659 entre Belascoain y Gervasio; CU-10200 Ciudad de La Habana, kubesp@enet.cu

Fondo/Aliĝo al ILEI:

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2010: 19

Nombro da rajtigataj / nomumitaj komitatanoj por 2010:

Retejo:

Retgrupo:

Revuo:

Enlanda membrokotizo:

Estraro: sekciestro Marta Alonso Gutierrez, Malecon 659 entre Belascoain y Gervasio; CU-10200 Ciudad de La Habana, kubesp@enet.cu

Mandato-periodo:

Agado 2010: (Ne ricevis raporton)

Evidente la sukcesa okazigo de la 43a ILEI-konferenco ludis ĉefan rolon en la agado de la sekcio. Vidu en nia retejo prelegojn el la konferenco pri Esperanto en Kubo.

Nederlando



ILEI-Nederlando

Adreso: Robert Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, oovo14qh@kpnmail.nl

Fondo/Aliĝo al ILEI:

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2010: 22

Nombro da rajtigataj / nomumitaj komitatanoj por 2010:

Retejo:

Retgrupo:

Revuo: “NGGE Sciigas”, trifoje,

Enlanda membrokotizo:

Estraro: Rob MOERBEEK –prezidanto, Julija BATRAKOVA – kasisto, Simon SMITS – protokolanto, Atilio ORELLANA ROJAS - sekretario

Mandato-periodo:

==Agado 2010==

La prezidanto dufoje ĉeestis estrarkunvenojn de Esperanto Nederlando. Pruviĝis ke la strategia plano pri instruado bezonas adapton. En la ILEI-konferenco en Matanzas, Kubo, reprezentis nian sektion Rob Moerbeek kaj Simon Smits. Rob interalie prezentis la paroligan kartludon “La ludo de la nuda vero”(tradukitan de Marlijine Hemelaar). Li krome pledis por enigo de UN-rilataj aferoj en niajn lecionojn, kaj estis deklarita komisiito pri UN-aferoj. Rob Moerbeek kaj Simon Smits prezentis la nederlandan en lingva festivalo kaj deĵoris en la UK ĉe ILEI-budo. Por niaj apartaj NGGE-rilatoj kun la kolegoj en Kubo,ni decidis havigi 4 paperajn abonojn de Internacia Pedagogia Revuo pro la tieaj malfacilaĵoj uzi interreton. Nia studotago okazis la 23a-an de oktobro ĉe UEA kun partopreno de 10 personoj. Nia temo pri supersignoj ne estis plene traktebla; Simon Smits rakontis pri la ILEI-konferenco kaj vendis librojn de ILEI; ankaŭ eblis ion prezenti el la dana literaturo. NGGE lanĉis novan iniciaton, kun subteno de la estraro de Esperanto Nederlando: ekde septembro 2010 povis aperi kvar “Alternsemajnaj(Ĉu-monataj) ripetoj”. La celo estas evitigi la infektajn erarojn, kiujn ni transprenadas unu de alia.

(El la sekretaria jarraporto en “NGGE Sciigas”, liverita de prezidanto Rob MOERBEEK dum 44a ILEI-K)

Norvegio:



ILEI-Norvegio

Adreso: Anne-Karin Bondhus, Morenefarefaret 8A, NO-4340 Bryne, akbondhus@jkn.no

Fondo/Aliĝo al ILE:

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2010: 6

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2010:

Retejo:

Retgrupo:

Revuo:

Enlanda membrototizo:

Estraro: estro Anne-Karin Bondhus, Morenefarefaret 8A, NO-4340 Bryne, akbondhus@jkn.no

Mandato-periodo:

Agado 2010 (Ne ricevis raporton)

Pollando



Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI-Pollando (ILEI-PL) –Międzynarodowy Związek Nauczycieli Esperantystów ILEI-Polska (ILEI-PL)

Adreso: Tomasz Chmielik, ul. Jarzębinowa 3/33, PL-21-040 Świdnik, tchmj@wp.pl, estraro@ilei.pl

Fondo/Aligo al ILEI:1997/1997

Jura statuso: La 31-an de julio 2007, registro ĉe la Regiona Tribunalo de Urbo Krakovo

Rilato kun Landa Asocio de UEA: plene sendependa

Membro-nombro fine de 2010: 27(9 paperaj, 18 retaj)

Nombro da rajtigataj / nomumitaj komitatanoj por 2010: 2/2(Małgorzata Nitkowska; Magdalena Tataro)

Retejo: www.ilei.pl (zorgas Małgosia Komarnicka)

Revuo: IKONO – Interesaj Kompilitaj Novaĵoj

Enlanda membrotizo: 54 zł papera, 25 zł reta, ĉ. 30% oni restigas por la sekcia agado

Estraro:

Prezidanto – Tomasz Chmielik tchmj@wp.pl

Sekretario – Małgosia (Małgorzata J.) Komarnicka margareta.ilei.pollando@gmail.com

Kasisto - Magdalena Tataro mtatara@gmail.com

Mandato-periodo: la sekvaj elektoj ĝis la junio 2011

==Agado 2010 ==

Propraj aranĝoj dum 2010:

- Ekstas nova informilo de la pola sekcio IKONO (Interesaj Kompilitaj Novaĵoj) dissendata al la membroj de la sekcio.
- Elsendo en la pola radio pri Esperanto (krakova radio) kadre la ĉiutaga elsendo Przed Hejnałem (Antaŭ la Hejnaŭo) – partoprenis ĝin i.a. Magdalena Tataro kiu parolis pri eblecoj de lernado de Esperanto en Krakovo, lodza radio – kelkfoje Robert Kamiński, membro de ILEI-PL, partoprenis elsendojn
- Grundtvig kaj Esperanto: kadre la Grundtvig-Programo (la programo EU Dumviva Lernado) la sekretario de la pola sekcio Małgosia Komarnicka pasigis 10 monatojn en Interkultura Centro Herzberg en Germanio
- KER-ekzamenoj: La ekzamenojn sukcese (C1 nivelo) trapasis la sekretario Małgosia Komarnicka kaj la kasisto Magdalena Tataro de la sekcio kaj aliaj 6 membroj de ILEI-PL je la niveloj C1 kaj B2
- Pola Sekcio estas patrono de la rubriko Legu kaj Ĝuu en la revuo Juna Amiko
- Małgosia Komarnicka (la sekretario de la sekcio) estas rubrikestro de la rubriko *Legu kaj Ĝuu* en Juna Amiko
- Kunlaboro kun la Klubo Esperanto en Mikołów. Komuna preparado de la aranĝo pri Esperanto kunligita kun disdono de la unua premio en la konkurso La floro de la filiko de la revuo Juna Amiko kies patrono estas pola ILEI-sekcio
- preparado de la parto programo dum Esperantaj Tagoj de Krakovo – junio 2010 – debato pri la nuna situacio de instruado kaj lernado de Esperanto en Pollando – gvidita de la sekciestro Tomasz Chmielik
- Subteno de eldono de la lernolibro de Edward Malewicz
- Preparado kaj projekto de eldono de Esperanta Kantaro por Infanoj preparita de Ela Hareźlak
- La sekretario de la pola sekcio Małgosia Komarnicka ricevis la Unuan Premion en la Konkurso GRUNDTVIG- Programo Dumviva Lernado kiel la plej bona laboranto de la jardeko pro la rakonto Grundtvig kaj Esperanto! Malofte okazas, ke dum grava neesperanta evento la principan premion ricevis Esperantisto.
- Priskribo de la Asistanteco de Małgosia Komarnicka estas ekzemplo de Bona Praktiko kaj estos libroforme eldonita printempe 2011 (tiu priskribo estos montrata al eŭropanoj).

Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:

- PEA – Dzień Różnorodności en Varsovio
- Ĉeesto en renkontiĝoj de Krakova Societo ESPERANTO kaj kontribuo en Esperantaj Tagoj de Krakovo
- Ekonomia Forumo en Krynica
- Mikołów – preparado (kune kun la Klubo Esperanto) de la aranĝo pri Esperanto kunligita kun disdono de la unua premio en la konkurso La floro de la filiko de la revuo Juna Amiko kies patrono estas pola ILEI-

sekcio

- Grundtvig – Asistanteco: raporto kaj konkurso kiujn ĉeestis la sekretario de pola sekcio Małgosia Komarnicka

Propraj projektoj dum 2010:

- Kunlaboro kun Krakova Societo ESPERANTO
- Kunlaboro kun de la Supera Lernejo Paweł Włodkowic en Płock
- Elsendoj en pola radio pri Esperanto (krakova radio kaj lodza radio)
- Registrado de la E-kursoj en Pollando en interretaj paĝoj de pola sekcio.
- Kunlaboro / Interkonsento kun krakova altlernejo WSZiB (Wyższa Szkoła Zarządzania i Bankowości) por enkonduki instruadon de la lingvo Esperanto se estos interesiĝo.

Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:

- PEA – Dzień Różnorodności en Varsovio
- Kunlaboro kun Krakova Societo Esperanto
- Ekonomia Forumo en Krynica
- Grundtvig – Asistanteco: raporto kaj konkurso kiujn ĉeestis la sekretario de pola sekcio Małgosia Komarnicka

Varba agado en Esperanto:

Dissendado de reklamiloj kaj informado dum ĉiuj renkontiĝoj kaj ankaŭ pere de la sekcia paĝaro; personaj diskutoj, kunlaboro ĉe la Grundtvig-Projekto.

Varba agado en naciaj lingvoj:

- Preparado de la vespero La floro de la filiko en la Urba Biblioteko - sidejo de la Klubo Esperanto en Mikołów.
- Elsendoj en pola radio pri Esperanto (krakova radio kaj lodza radio)
- Priskribo de la Grundtvig-Asistanteco de Małgosia Komarnicka
- Raporto de la staĝado en Herzberg de Małgosia Komarnicka

Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:

- Kunlaboro kun krakova altlernejo WSZiB (Wyższa Szkoła Zarządzania i Bankowości)
- Kunlaboro kun de la Supera Lernejo Paweł Włodkowic en Płock
- Kunlaboro kun Asocio de Pola-Franca Amikeco (Towarzystwo Przyjaźni Polsko-Francuskiej)
- Kunlaboro kun Grundtvig-organizaĵo en Pollando

Konata E-instruado en via teritorio:

Universitato Adam Mickiewicz (UAM)

Elementa lernejo - Szkoła Podstawowa nr 50

Elementa Lernejo nr 2 en Gubin

Elementa lernejo-Szkoła Podstawowa nr 2

Szkoła Podstawowa nr 34 z Oddziałami Integracyjnymi

Jagelona Universitato

Elementa Zamenhof-Lernejo

Centro Ludoviko Zamenhof

Szkoła Podstawowa nr 1 im. B.Prusa

UNIVERSITATO DE LA TRIA AĜO en Olsztyn, Wrocław, Nowy Sącz

Detalaj informoj estas ĉe:

<http://www.edukado.net/?search=1&elementId=154&orderby=lando%7CDESC&lando=PL>

Historio kaj Estonto

Historio:

Ne ankoraŭ. La pola sekcio ĝis nun ricevis neniun dokumenton de antaŭa prezidantino. Nun Małgosia Komarnicka, la sekretario de la organizaĵo zorgas pri konservado de nuna historio de la sekcio kaj ĝi certos publikigota. La estraro kolektas materialojn por prepari monografion pri la historio de la pola sekcio.

Perspektivoj por 2011

Membro-nombro:

ĉ. 30, oni rimarkas kreskon, bona prognozo

Juna Amiko – 14 abonantoj

Agado:

Oni planis prepari la unuan Konsultiĝon de ILEI en Nowy Sącz kaj daŭrigi enkonduki Statistikon de

Instruado sur la paĝaroj de la pola sekcio.

Eldono de la E-Kantaro preparita de Ela Hareźlak kaj helpo por aperigi la lernolibron de E. Malewicz.

Kunlaboro kun ILEI:

Vidu sube: Opinioj pri ILEI

Kontribuoj al ILEI:

Ni intencas plifortigi la membraron de la sekcio kaj daŭrigi la ĝisnunan agadon. Ni volus intensigi kontaktojn kun la ILEI-sekcioj en Orienta kaj Meza Eŭropo kaj volus efektiviĝi nian ideon pri konsultaj renkontiĝoj por ellabori komunajn agadplanojn kaj antaŭenigi kunlaboron en tiu parto de Eŭropo.

Instruista trejnado:

La pola sekcio kunlaboras kun aliaj organizaĵoj kaj provas atingi stipendiojn por landaj instruistoj. La plej urĝa afero estas nun trovi sponsorojn por eldoni novan, modernan lernolibron. La sekcio vaste reklamas pri E-lernado kaj instruado.

Opinioj pri ILEI:

La ILEI-estraro dediĉas tro malmulte da atento al la pola sekcio, ekz. ignorante nian proponon por aranĝi konsultiĝojn. La sugesto, ke tio okazu en Kopenhago inter io kaj alio, haste, estis ĝuste la pruvo de tiu ignoroo. Ĉar kelkfoje ni ne ricevis bezonatan kaj atendatan subtenon, ni dume ne ligas pli grandajn esperojn kun helpo de ILEI. Laŭ ni estus pli bone fari malpli da tn. paperaj sukcesoj kaj ne produkti troigo-plenajn, plumpajn, fanfaronemajn, hura-optimismajn dokumentojn, sed antaŭ ĉio klopodi sproni kaj pli intensigi la internan vivon de la sekcioj per realaj proponoj, konforme al iliaj kapabloj organizaj kaj financaj.

La ĉiujaraj ILEI-konferencoj servas nur al turismaj celoj kaj estas agrabla tempopasigilo. Ie perdiĝis la scienca laboro. Tio devus nepre ŝanĝiĝi. Se ni ne volas fariĝi plia rondo de reciproka adorado. Ŝokas la prezoj de tiuj aranĝoj, kio malebligas al pluraj ilin partopreni. Se la venontjara konferenco estos organizita ie en Azio, ni devos konstati kun bedaŭro, ke denove nur malmultaj povos iri tien. Kaj eble tio estas taktiko, por en la elekto-jaroj organizi esperantajn aranĝojn malproksimege, por ne venigi multnombrajn partoprenantojn. Ekz. tiaj ni traktas la kubajn kongreson kaj konferencon pasintjare.

Ni volas substreki, ke ni ĉiuj laboras nur honorofice, do oni ne povas postuli, ke la homoj faru pli ol ili povas. Kun bedaŭro ni konstatas, ke en Kopenhago plej versajne estos neniu el la estraro de la pola sekcio, ĉar la kostoj superkreskis nin.

Ni ankaŭ ne forgesas, ke dum kvereloj kaj longdaŭra konflikto ene de la pola sekcio (feliĉe jam finitaj) ni neniam povis kalkuli pri la helpo kaj apogo de la ILEI-Estraro. Ankaŭ tio ne estas sekreto, ke kontraŭ nia prezidanto okazas daŭraj atakoj, kies celo estas misfamigi kaj ridindigi lian laboron, kapablojn kaj eĉ lingvokonon. Tiuj atakoj bedaŭrinde ne finiĝas, kio ne estas bona aŭguro por la estonteco.

(ILEI kompreneble verkis respondon al tiuj opinioj. Kiu interesiĝas, povas peti tion)

(Raportis Tomasz Chmielik, prezidanto, la 30an de marto 2011)

Rumanio



Rumana ILEI-Sekcio - Sectia Romana a ILEI

Adreso: Mihai Trifoi, Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, mihaitrifo@yahoo.com

Fondo/Aliĝo al ILEI:1997/1998

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2010: 18

Nombro da rajtigataj / nomumitaj komitatoj por 2010:

Retejo:

Retgrupo:

Revuo: ne

Enlanda membrotizo:

Estraro:estro Mihai Trifoi,Str.Principala Bl.1 Ap.3,RO-527116 Bixad/Jud.Covasna, mihaitrifo@yahoo.com

Mandato-periodo:

Agado 2010:(Ne ricevis raporton)

Serbio



ILEI-Serbio

Adreso: Radojica Petrovic', Bul. oslobodjenja 36, 32000 C'ac'ak, radojica.petrovic.rs@gmail.com

Fondo/Aliĝo al ILEI:

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2010: ■■

Nombro da rajtigataj / nomumitaj komitatanoj por 2010:

Retejo:

Retgrupo:

Revuo:

Enlanda membrototizo:

Estraro: ESTRO Radojica Petrovic', Bul. oslobodjenja 36, 32000 C'ac'ak, radojica.petrovic.rs@gmail.com

Mandato-periodo:

Agado 2010:(Ne ricevis raporton)

Svedio



ILEI-Svedio:

Adreso: Agneta Emanuelsson, Carl Ugglas väg 6, SE-641 37 Katrineholm, agi.emmanuelsson@telia.com

Fondo/Aliĝo al ILEI:

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2010: 12

Nombro da rajtigataj / nomumitaj komitatanoj por 2010:

Retejo: <http://ilei.info/svedio/eo>

Retgrupo:

Revuo:

Enlanda membrotizo:

Estraro: prezidanto Agneta EMANUELSSON, sekretario Fredrik OLOFSSON, Torkelstorpsvägen 248, SE-430 33 FJÄRÅS, kasisto Sten SVENONIUS, Inga JOHANSON, vickasisto, Stampgatan 60 B-127, SE-411 02 GÖTEBORG, +46 (0)31-15 57 23

Mandato-periodo:

Agado 2010: (Ne ricevis raporton)

Svislando



Svisa ILEI Sekcio (SIS)

Adreso: Mireille Grosjean, Grand-rue 9. Pf. 9, CH-2416 Les Brenets, mirejo.mireille@gmail.com

Fondo/Aliĝo al ILEI:1974/1974

Jura statuso: Asocio laŭ svisa juro

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2010: 17

Nombro da rajtigataj / nomumitaj komitatanoj por 2010:

Retejo:

Retgrupo:ne

Revuo: ne

Enlanda membrokotizo: CHF30

Estraro: prezidanto – Mirejo Grosjean, sekretario – Francisko Randin

Mandato-periodo:

==Agado 2010==

En Svislando ni havas elstaran pedagogon sinjoron Claude Gacond. Li agadas, instruas, organizas seminariojn, en CDELI, Centro pri Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia en La Chaux-de-Fonds. Li fariĝis 80jara kaj okazis honore al li granda festo pasintan sabaton. Nun li transdonis la taskon de la studsabatoj al tri kunlaborantoj: Luko Allemand, Monika Molnar kaj Nancy Fontannaz. Nun li redaktas la informilon SESinformas kunlabore kun Stefano Keller kaj Richard Schneller. En la sama urbo La Chaux-de-Fonds estas privata lernejo "La Grande Ourse" (la granda ursino), kie la lernantoj lernas eon. Ne estas aliaj kursoj krom en la lokaj kluboj.

Raportas Mireille Grosjean la 29a aŭguste 2011

Togolando



TIETTI-Instituto de Esperanto en Togolando(TIET) - TIETTI-Institut de Espéranto aŭ Togo (TIET)

Adreso: Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T. I. E. To, B.P. 13169, Lome-TOGO, esp.togo@cafe.tg

Fondo/Aliĝo al ILEI:1992/1999

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA: TIET estas la eduka fako de la landa asocio UTE (Unuiĝo Togolanda por Esperanto)

Membro-nombro fine de 2010:5

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2010: 1/1(ATTIOGBE-AGBEMADON Mensaf Biova)

Retejoj:ne

Retgrupo:ne

Revuo: ONDO da VERO (OV), reta(3monate) kaj papera(6monate),redaktoro Parfo AJTO (kaŝnomo de GBEGLO Koffi).

Enlanda membrokotizo: KhK

Estraro: Respondeculo ATTIOGBE-AGBEMADON M. Biova; Ĝenerala Sekretario GBEGLO Koffi esp.togo@cafe.tg; Kasisto SAGBADJELOU Kokou <koksagba@yahoo.fr>

Mandato-periodo:2jaroj

==Agado 2010==

TIET estas la eduka fako de la landa asocio en Togolando. Ĝi organizas la tutan instruan laboron en la lando, okazigas ekzamenojn ĉiujare, kaj nun la plej granda laboro estas la funkciigo de Instituto Zamenhof. Malfermite siajn pordojn en septembro 2004, Instituto Zamenhof (IZo) nun havas pli ol kvarcent gelernantojn. Pri la lernado de la gelernantoj, la formado de la geinstruistoj zorgas TIET. La kursoj Esperantaj en la diversaj kluboj de la landa asocio estas taskoj de TIET.

Neforgesindas la instruado de Esperanto en IZ. Pli ol 200 gelernantoj lernas la lingvon dum normalaj studhoroj.

TIET aparte respondecas pri la organizado de la kvizo de TEK (Togolanda E-Kongreso).

Propraj aranĝoj dum 2010:

En 2010 TIET plufaris sian agadon. En aŭgusto estis kursoj divergradaj en Instituto Zamenhof. Okazis la ekzameno A de TIET, ankaŭ la elementa kaj meza de ILEI/UEA.

Aliaj aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:

Dum la 18a Togolanda Esperanto Kongreso, TIET organizis kursojn kaj diskutrondojn. Ankaŭ la organizado de la kvizo estis tasko ĝia. Krome ĝia financado de la kongreso ebligis al tiu ĉi okazi.

Propraj projektoj dum 2010:

Kursoj en aŭgusto

Instruado de Esperanto en IZ

Okazigo de ekzamenoj

Funkciigo de Instituto Zamenhof

Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:

Okazigo de la 18a Togolanda kongreso

Varba agado en Esperanto:

Varba agado en naciaj lingvoj:

Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:

Ne estas

Konata E-instruado en via teritorio:

La aĝoj de niaj gelernantoj estas almenaŭ 10 jaroj. En IZ estas pli ol 200 gelernantoj, al kiuj aldoniĝas laŭokazaj gelernantoj, plenkreskuloj. Ekzistas ankaŭ sekvantoj de perkoresponda kurso.

La libroj uzataj estas Zagreba Metodo, Metodo 11, Por la Praktikantoj, Metodo 12.

Aliaj atingoj en 2010

Revizio de la ekzamena sistemo de la sekcio. Estas nun tri niveloj en la ekzamenoj naciaj:

Nivelo A por komencantoj

Nivelo B por Progresantoj

Nivelo C por E-instruantoj

Historio kaj Estonto

Historio:

Ĝi ekzistas ĉe la paĝo: esperanto.org/TIETo/

Perspektivoj por 2011

Membro-nombro:

Nenio antaŭvidiĝas, stabileco

Agado:

Ni planas organizi semajnfinajn kursojn al plenkrekuloj en Instituto Zamenhof

Kunlaboro kun ILEI:

Nun ne!

Kontribuoj al ILEI:

La membroj de la estraro de TIET pretas fari tiajn laborojn. Ni havas homojn en nia lando, kiuj volonte agas internacie, ekzemple kadre de komisiono de ILEI. S-roj GBEGLO Koffi , SAGBADJELOU Kokou kaj DOUMEGNON Koffi estas pretaj membri en tiaj komisionoj.

Instruista trejnado:

Ne havas eblecon

Opinioj pri ILEI:

Helpoj de ILEI al TIET tute ne sentebblas. Kiajn helpojn proponas ILEI al siaj sekcioj?

(Raportis GBEGLO Koffi, ĝenerala sekretario la 20-an de februaro 2011)

Ukrainio



Ukrainia Ligo de Esperantistoj Instruistoj (ULEI)

Adreso: Volodimir Hordijenko, p/k35, KIIV-133, UA-01133, volodomir@ukr.net

Fondo/Aliĝo al ILEI:2000/2003

Jura statuso:

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

Membro-nombro fine de 2010: 18

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2010:

Retejo:

Retgrupo:

Revuo:

Enlanda membrokotizo:

Estraro:estro Volodimir Hordijenko, p/k35, KIIV-133, UA-01133, volodomir@ukr.net

Mandato-periodo:

==Agado 2010==

1. Kadre de “Aroma Jalto-2010” okazis 5 prelegoj en “Universitato” fare de la akademiano de Esperanto Pavel Moĵaev, la instruistoj T.Auderskaja, J.Zajdman, ankaŭ prelegis Wolf Krüger el Germanio kaj Ben Indestege el Belgio
2. Kadre de “Aroma Jalto-2010” okazis 2 nivelaj E-kursoj, sub gvido de Anxela Belenko, Tatjana Auderskaja, kiujn ĉeestis 24 kursanoj.
- 3.Lanxis kaj aktualigis paĝaron de ULEI, A.Jankovskij, V.Hordijenko (<http://ulei.retejo.net>)
- 4.Okazis ULEI-kunvenoj en Jalto la 2-an de majo kaj en Kijivo, la 19-an de novembro sub gvido de la sekciestro V.Hordijenko.
- 5.Elementaj E-kursoj okazis en Jalto sub gvido de Jefim Zajdman kaj Anxela Belenko, en Kijiv instruis V. Hordijenko, Evhenia Slovaĉevskaja, Svitlana Kozarenko, A.Jankovskij, en Hxarkiv instruis S.Bojko.
- 6.Esperanto, kiel deviga studobjekto, estas daŭre instruata en Kijivo en la liceo №38 fare de Evhenia Slovaĉevskaja.
7. Esploris eblecon por enkonduki Esperanton, kiel studobjekton en la specialigitaj lernejoj, liceoj, gimnazioj pri eksterlandaj lingvoj, V. Hordijenko.
8. Prezentis publikan prelegon laŭ la temo "Internaciaj lingvoj. Esperanto" en Volinia nacia universitato, N.Daniljuk
9. Esploris eblecon instrui Esperanton en Kijivaj Universitatoj kaj prepariĝis al Universitata instruado, S. Pogorelaja.

(Raportas Volodimir Hordijenko sekciestro de ULEI)

Usono kaj Kanado



AMERIKA ASOCIO DE INSTRUISTOJ DE ESPERANTO (AAIE)

Adreso: Ronald Glossop, 8894 Berkay Avenue, Jennings MO 63136-5004 (U.S.)
rglossop@mindspring.com

Fondo/Aliĝo al ILEI: 1959/1963

Jura statuso: Sendependa organizo por instruistoj de Esperanto en Usono kaj Kanado

Rilato kun Landa Asocio de UEA: sendependa organizo sed kunlabora kun Esperanto-USA.

Membro-nombro fine de 2010: 54 membroj: 28 retaj, 26 paperaj (20 DM)

Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2010: 3/3 (Ronald GLOSSOP - Lucy HARMON - William HARRIS – Duncan CHARTERS)

Retejo: <http://aaie.us>; kaj <http://www.aaie.us>

Retgrupo:

Revuo: la landa BULTENO - la redaktoro estas Doroteo Holland

Enlanda membrokotizo: reta - USD 20; papera- USD 40

Estraro: Prezidanto Ronald GLOSSOP; rglossop@mindspring.com, Vic-Prezidanto D. Gary GRADY;
Kasisto - Charles MAYS, Koresponda Sekretario Sally LAWTON, Eduka Sekretario Sherry WELLS

Mandato-periodo: Ĝis 2011 por Prezidanto, Vicprezidanto, kaj Koresponda Sekretario; ĝis 2012 por Kasisto kaj Eduka Sekretario. Komence de la jaro 2012 la ofic-periodo de ĉiuj kvin funkciuloj estos tri jaroj anstataŭ du jaroj kaj ĉiuj kvin estos elektitaj samtempe.

==Agado 2010==

Propraj aranĝoj dum 2010:

La 2010-jarkunsido de AAIE okazis je la 29-a de Majo en la kadro de la jara landkongreso de Esperanto-USA en la ĉefurbo de la lando Vaŝingtono. Dum tiu jarkunsido estis elektitaj por 2-jara deĵoro nova Kasisto Charles MAYS kaj estis reelektita Eduka Sekretario Sheri WELLS. La deĵoro de la aliaj tri funkciuloj Prezidanto Ronald GLOSSOP, Vic-Prezidanto D. Gary GRADY, kaj Koresponda Sekretario Sally LAWTON daŭros dum alia jaro. Doroteo HOLLAND daŭros esti la Redaktoro de la landa BULTENO.

Per voĉdono de la membroj dum la lasta parto de la jaro, ni aprobis gravan ŝanĝon en la AAIE-Statuto. Komence de la jaro 2012 la ofic-periodo de ĉiuj kvin funkciuloj estos tri jaroj anstataŭ du jaroj kaj ĉiuj kvin estos elektitaj samtempe.

La 2011-jarkunsido de AAIE okazos je la 19-a de Junio en la kadro de la jara landkongreso de Esperanto-USA en Emeryville, Kalifornio apud Sanfrancisko kaj la loko de la oficejo de E-USA.

Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:

Sendube la ĉefa eduka afero pri la instruado de Esperanto en Usono estis la 41-a trisemajna Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) kiu okazis ĉe la Universitato de Kalifornio en San-Diego (UCSD) ekde la 27-a de Junio ĝis la 17-a de Julio denove ĉe la Universitato de Kalifornio en San-Diego (UCSD). La profesoroj/instruistoj estis el Nederlando Katalin KOVATS, el Israelo Amri WANDEL, kaj el Usono Duncan CHARTERS, Grant GOODALL, Orlando RAOLA, kaj Lee MILLER. En la jaro 2011 NASK daŭros nur unu semajnon ekde la 2-a de Julio ĝis la 10-a de Julio. Por informo pri NASK kontaktu la Administrantinon Ellen EDDY ĉe <Eddyellen@aol.com>.

La Eduka Sekretario Sherry WELLS faris prezentaĵojn pri Esperanto ĉe la kongresoj de organizoj de instruistoj de fremdaj lingvoj por la ŝtato Michigano kaj por la ŝtato Ilinojso. Duncan CHARTERS kaj Ron GLOSSOP subtenis ŝin ĉe la kongreso en Ilinojso.

La Prezidanto Ron GLOSSOP instruis Esperanton en Ĉinio dum kvin semajnoj en aŭtuno kaj parolis pri tio en Usono dufoje.

La Kasisto Charles MAYS iris al BONA ESPERO en Brazilo por helpi rilate al komputiloj.

Propraj projektoj dum 2010:

Ĝenerale en Usono kaj Kanado oni ne rajtas instrui Esperanton en lernejoj dum la kutimaj horoj. Tamen Darcy ROSS aranĝis instruadon de Esperanto ĉe la Universitato de Ilinojso kaj gvidis grupon de studentoj al la landa kongreso en Vaŝingtono. Gary ANDERSON instruas Esperanton en speciala duagrada lernejo en

Seatlo. Gertrude NOVAK instruis nekreditan kurson en kolegio en Ĉikago. Mar CARDENAS instruis Esperanton al skoltinoj en Kalifornio. Thomas RUSCH instruis infanojn en kafejo. Kim KEEBLE en Kanado instruis Esperanton en klubo en lernejo dum la tagmanĝa horo. Elizabeto DORCAS instruis Esperanton al infanoj en sia domo en Teksaso. Doroteo HOLLAND instruis Esperanton al tri plenkreskuloj en domoj en Kalifornio. Hoss FIROOZANIA, Duncan CHARTERS, kaj Ed WILLINGER instruis Esperanton al studentoj en universitatoj en Novjorkio, Ilinojso, kaj Kalifornio. Eble estas alia instruado kiun oni ne raportis.

Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:

NASK; Infanoj ĉirkaŭ la Mondo sendas edukajn materialojn al Afriko kaj Ĉinio.

Varba agado en Esperanto:

Varba agado en naciaj lingvoj:

Ron GLOSSOP parolis al duagrada lernejo en Nov-Hampshiro pri Esperanto kaj lia vojaĝo al Ĉinio.

Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:

La Eduka Sekretario Sherry WELLS varbis por Esperanto per prezentaĵoj al kluboj de Rotarianoj kaj al aliaj grupoj. Kunlaboro kun la universitatoj kie laboras la membroj de AAIE.

Konata E-instruado en la teritorio:

Aliaj atingoj en 2010

Bedaŭrinde la fakto estas ke en Usono kaj Kanado estas tre malfacile trovi lernantojn por Esperanto aŭ eĉ por iuj ajn fremdaj lingvoj krom kelkfoje por la hispana en Usono kaj por la franca en Kanado.

Tamen AAIE havas retejon ĉe <<http://aaie.us>>. Ankaŭ Prezidanto GLOSSOP, kiel Direktoro de "Infanoj ĉirkaŭ la Mondo," kun la granda helpo de AAIE-membro Enrique ELLEMBERG, subtenas retejon <<http://www.icxlm.org>>. Enrique ankaŭ havas sian propran retejon por instrui Esperanton ĉe <http://esperantofre.com/>.

Historio kaj Estonto

Historio:

Perspektivoj por 2011

Membro-nombro:

La situacio estas stabila, sed multaj membroj estas maljunaj.

Agado:

Ĝenerale en Usono kaj Kanado oni kutime ne rajtas instrui Esperanton en lernejoj dum la kutimaj horoj. Tamen kelkaj membroj de la sekcio klopodas fari tion. Ankaŭ ili instruas eĉ en siaj propraj domoj.

Kunlaboro kun ILEI:

Duncan CHARTERS el nia organizo estas la Vic-Prezidanto de ILEI.

Kontribuoj al ILEI:

Ron GLOSSOP kaj aliuloj kontribuas monon al la fondusoj kiuj helpas ILEI-anojn.

Instruista trejnado:

Opinioj pri ILEI:

Ni opinias ke ILEI bone funkcias, kaj IPR estas tre valora revuo.

(Raportis Ronald GLOSSOP, Sekciestro por AAIE, la 29an de januaro 2011)

ALDONO-1: Re prezentantoj de ILEI

En sekvaj landoj ne ekzistas formala sekcio sed ekzistas reprezentantoj (inkluzive en la jaro 2011). Unu sendis raporton. Post la landnomo aperas la nombro de membroj por 2010.

Armenio (5)

Reprezentanto: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, Lidaelb@yahoo.com

Barato/Hindujo (2)

Reprezentanto: Venkatesh Reddy, No. 216, Off main Road, Whitefield, Bangalore 66, Karnataka, esperovr@yahoo.co.in

Bulgario (0 en 2010, sed 5 ekde 2011)

Reprezentanto: Mariana Gencheva, Targovska 95, BG-5180 Polski Trambesh, maries972@yahoo.com

Ĉ'ilio: (1)

Reprezentanto: Hector Campos Grez, Casilla 231, Curico, CL-Septima Region, hecg@uea.org

Ganao (1)

Reprezentanto: Alfred Kobina Arthur, P.O. Box TS 404, Teshie Accra, abaako43@yahoo.com

Islando (1)

Reprezentanto: Loftur Melberg Sigurjonsson, Tradarberg 13, IS-221 Hafnarfjordur, loftur@skyr.is

Israelo (2)



Reprezentanto: Gian Piero Savio, 13/4 Menora-str. IL-53490 Givatajim, saviogp@zahav.net.il

== Agado ==

Filmo pri israela esperanta poeto:

<http://www.vimeo.com/15003630>

Filmeto por varbado en la hebrea:

<http://www.vimeo.com/19923396>

1. En Edukado.net: Beit-sefer Mamlahti Boroĥov Israelo
2. Kluba kurso de ELI por 5 plenaĝuloj

(Raportis Gian Piero Savio)

Kongo DR (3)

Reprezentanto: Viktor Lukolama Lufimpu, c/o Mampuya Diakiese, B.P. 7598, CILU, Kinshasa 1, kekcd@yahoo.fr

Nov-Zelando (1)

Reprezentanto: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1, gwenda.s@ihug.co.nz

Uzbekistano (1)

Reprezentanto: Eugeno S. Perevertajlo, Abon. jashik 140, Pochtamt, UZ-700000 Taskent, CIS, esperuzo@mail.ru

ALDONO-2 Kontaktpersonoj de ILEI

En sekvaj landoj ne ekzistas formala sekcio sed tamen kontaktpersonoj (inkluzive en la jaro 2011).

Bolivio (1)

kontaktpersono: Leandra Dia Rios, Calle María Estiváriz No 290, Avenida Coronel Valdez Pasaje Zaratustra, Villa Pabón, Zona Central, mileis_7@hotmail.com

Bosnio kaj Hercegovino (0)

kontaktpersono: Nimeta Kulenovic', Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Estonio (0)

kontaktpersono: Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Haitio (1)

kontaktpersono: Christine Theano, Christ-Roi, Imp. Romane # 41, HT-6110 Port-aŭ-Prince, christinetheano@hotmail.com

Indonezio (0)

kontaktpersono: Iliia Sumiltia Dewi, Perumahan, Pejuang, Pratama, Blok L, no. 11, RT/RW 003/006, Bekasi, Jawa Barat, ilia.dewa@gmail.com

Kostariko (0)

kontaktpersono: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San Jose, tikoguai@gmail.com

Litovio (2)

kontaktpersono: Algimantas Piliponis, Kavoliuko 3-93, LT-04325 Vilnius, piliponis@centras.lt

Nepalo (1)

kontaktpersono: Bharat Kumar Ghimiere, Nepala Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 10518, Kathmandu, nspa.bharat@hotmail.com

Urugvajo (2)

kontaktpersono: Sonia Risso, Pascual Costa 3253 Apto 1215, UY-11700 Montevideo, sonry@adinet.com.uy

Ni kore dankas al la sekcioj, kiuj raportis, kaj kore maldankas al tiuj, kiuj ne faris tion.

Evidenta fadeno el la raportoj, kaj el nia sperto entute, estas ke ILEI devas atenti pli forte la sekciojn, kaj evoluigi pli fortan serion da servoj por ili, aldone al tiuj, kiuj nun ekzistas kaj funkcias. Nia insisto sendadi persiste kaj senkompate al sekcioj informojn kaj alvokojn (meze unu ĉiusemajne) spegulas nian deziron kaj strebojn proksimigi la rilatojn inter niaj landaj kaj internaciaj niveloj.

Sed, kiel intensigi la servojn por sekcioj? Tio bezonas pliajn internaciajn laborfortojn – de kie ILEI ĉerpu tiujn? Nu, de kie alie, ol la sekcioj?



Stefan